ESPERANTO

SEPTEMBRO 1961

esperanto

REVUO INTERNACIA

SEPTEMBRO 1961

54a JARO

N-RO 670 - (9)

Fondito : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :
R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :
0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 57, Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO :

Prof. D-ro Hideo Yagi, Prezidanto de la 46-a Universala Kongreso en Harrogate, 1961, solene malfermas la kongreson.

Enhavo

Raportaro pri la 46a U.K. Harrogate :

Kongreso de la artoj kaj internacia kulturo 141
La solena inaŭguro 142
Malgranda elegio por G. Canuto . . . 143
Festparolado de Prof. Lapenna 144
La Unua Internacia Arta Festivalo . . 147
La Internacia Somera Universitato . . 152
La dumkongresa laboro de U.E.A. . . 154
Aliaj aranĝoj kaj gravaĵoj 157
La solena fermo 159

Rubrikoj

Radio 160
Oficiala Informilo 160

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

KONGRESO DE LA ARTOJ KAJ INTERNACIA KULTURO

Kun plezuro kaj absoluta sincero ni povas raporti, ke la 46a U.K. en Harrogate estis el ĉiuj vidpunktoj unu el la plej sukcesaj, ne nur el vidpunkto de la laboroj faritaj kaj la kulturaj manifestacioj, sed ankaŭ el vidpunkto de la kontento de la individuaj kongresanoj. La bela kongresa urbeto estis alloga, la deĵorantoj en la kongresejo estis ĉiam afablaj kaj helpemaj, la programo estis plena kaj interesa. Ni dankas kaj gratulas al la lokaj esperantistoj, kiuj tiel sindone laboris sub bonhumora gvidado de la prezidanto de L.K.K., s-ro R. W. Hamilton.

Plej elstara karakterizo de la Kongreso estis kompreneble la Unua Internacia Arta Festivalo, kuraĝa iniciato de la estrarano ŝarĝita pri la kongresoj, D-ro I. Lapenna, kaj manifestacio pri la atingoj de la Internacia Lingvo sur la arta kampo. Kvankam sendube en la postaj jaroj niaj Artaj Festivaloj kreskos kaj pliimponiĝos, tamen la unua provo brile sukcesis, tute speciale sur la teatra kampo. En la teatro ses diversaj programoj estis prezentitaj, kaj ili neniam falis sub la meza nivelo, plurfoje atingis eĉ la unuan nivelon. Elstaraj, ankaŭ el monda vidpunkto, estis precipe la folkloraj dancoj prezentitaj de la kulturarta societo "Branko Cvetković", el kies membroj proksimume la duono estas esperantistoj, kaj la teatraĵoj de la Internacia Arta Teatro, nia propra esperantista profesia dramkolektivo. Pli altkvalitajn prezentadojn ol ili oni apenaŭ povus atendi. Plej surprize estis ekscii, ke la societo "Branko Cvetković" estas fakte amatora — la membroj ankaŭ ĉiutage havas alian okupon — ĉar ia nuanco de amatoreco tute mankis en ilia prezento. Aliflanke, post la pruvoj pri ilia valoro, kiujn donis en nia 46a la Internacia Arta Teatro, ni firme esperas, ke la esperantistoj atentos la alvokon pri subteno, kiu troviĝis sur flugfolio aldonita al nia juli-aŭgusta numero.

Sur simile alta nivelo staris la kantado, (kiu estis tute en Esperanto, krom unu peco), de la junulara kantĥoro Ljubljana. Ni ne miras, ke en Jugoslavio tiu ĉi ĥoro de junaj esperantistoj akiris renomon kaj diversajn premiojn; la beleco de la voĉoj kaj la individua ĉarmo de la junaj kantistoj tuj kaptis la korojn de la kongresanoj. Grandan meriton havas ilia juna talentega ĥorestro Vili Sčuka, kies propraj komponaĵoj, inkluzive de muzikigo de "Ho mia kor' ", estis eble la plej belaj melodioj en belega programo.

Oni povus supozi, ke, inter tiom da profesiaj kaj kvazaŭprofesiaj prezentadoj, la pure amatoraj teatraĵoj iom postlamus. Tamen ni povas raporti, ke la rolantoj en "Okuni kaj Gohei" kaj en "La Urso", kvazaŭ inspiritaj de siaj profesiaj kolegoj, donis prezentadojn senriproĉajn; se mankis la "profesia magio", nur tio mankis. Tio estas des pli gratulinda koncerna la du amatorojn en "La Urso", kiuj lastmomente, pro malsaniĝo de la tria rolanto, akiris la helpon kaj, por tiel diri, konkurencon de unu el la "steloj" de la Arta Teatro, Mladen Šerment, kies potenca kaj polurita rolado estus povinta paligi la aliajn. Brave tamen ili eltenis la ludon kaj venkis fine eĉ la malhelpon de iom forta angleca prononcado! Se la amatora programo "Arto kaj Vivo", sub lerta gvidado de R. Dupuis, ne atingis la samajn altaĵojn, tio ne estas miriga se ni pripensas la kondiĉojn kaj malfacilaĵojn, kaj ĉiuokaze ĝi donis multe da plezuro al la ĉeestantaro.

Antaŭ ol forlasi la teatran flankon de la Festivalo, ni devas almenaŭ mencii la perfektecon de la teĥnika prezentado: la kostumoj, la rekvizitoj, la lumado, kaj aliaj akcesoraĵoj de la dramprezentado estis pli ol senmankaj.

Ankaŭ ekster la teatro la Festivalo funkciis, kvankam ne ĉiam tiel impone. Plej sukcesaj eroj estis verŝajne la Oratora Konkurso (kun 9 partoprenantoj), kaj la "Horeto de poezio", kiun, kvankam sin anoncis nur kvar deklamantoj, tre ĝuis la amasa ĉeestantaro. Krom la deklamkonkurso, okazis prezento de arta sonbendo de Radio Varsovio, kaj deklamado de propraj poemoj fare de konataj Esperantaj poetoj. La Belarta Konkurso okazis normale, kiel dum pli ol dek jaroj. John Francis estis nomita de la eldonejo KOKO "Aŭtoro de la jaro, 1961". En la kadro de la Festivalo okazis ankaŭ Konkurso por Afiŝoj, Foto-konkurso, Sonbenda Programo, kaj la prezentado de filmoj en Esperanto. Krom tio, la prelegoj en la Internacia Somera Universitato rilatis al artaj temoj.

La Festivalo, tiel multflanka, donis novan aspekton al la Kongreso kaj eminente montris la funkcion de Esperanto por la kreo de internacia kulturo. Varman dankon ŝuldas la movado al Prof. Lapenna ne nur pro la pionira iniciato, sed ne malpli pro la grandega persona helpo kiun li donis por la kompilo kaj realigo de la festivala programo.

Sur la kampo de la kongresaj laboroj, du temoj prenis la ĉefan lokon: la Projekto Oriento-Okcidento, kaj la Lerneja Kampanjo.

Ĉiuj aliaj laboroj de la Kongreso okazis normale. Kiel kutime, la Komitato kaj la Estraro kunvenis plurfoje, kaj pritraktis ampleksajn tagordojn. La plej gravajn decidojn oni povas legi sur alia paĝo; sed ni menciu ĉi tie, ke plej lastatempe U.E.A. fine povis aĉeti propran belan sidejon kun multaj ĉambroj en Roterdamo. Kiel konate, nian oficejon en Eendrachtsweg ĉiam minacadas malkonstruigo; jam tiu minaco ne plu timigas nin. En nia nova sidejo, al ĉiam pli imponaj sukcesoj kaj al venko de la internacilingva ideo!

W. Auld

LA SOLENA INAŬGURO

Je la 9a 30, dimanĉon la 6-an de aŭgusto, 1961, okazis en la urba teatro de Harrogate la Solena Inaŭguro de la 46a Universala Kongreso de Esperanto. La Kongreson malfermis Prof. D-ro Hideo Yagi, vicprezidanto de UEA kaj la Prezidanto de la Kongreso. Post omaĝo al la mortintaj Generalo Bastien kaj Prof. D-ro Canuto, li petis s-ron W. Auld deklami poemon de Marjorie Boulton memore al la forpasinta Prezidanto de UEA. Post la deklamo okazis omaĝa silentado de la kongresanoj, kaj post tio Prof. D-ro Yagi diris :

Estas al mi granda honoro, ke mi prezidas la 46an Universalan Kongreson. Mi estas certa, ke japano prezidas U.K. por la unua fojo. Tio estas granda ĝojo por mi. ĉar mi kredas ke tiu ĉi fakto montras al la mondo veran internaciecon de Esperanto, kaj ankaŭ estas granda honoro donita al la tuta japana esperantistaro, kiu komencis sian movadon jam en 1906, antaŭ 55 jaroj.

Mi salutas al Harrogate, bela urbo de ĝardenoj kaj floroj, ĉefurbo de graflando Jorkŝiro, kiu bonvenigas nian 46an. Kaj mi dankas al la Loka Kongresa Komitato, kiu sin okupis fervore por sukcesigi la kunvenon. Mi dankas al la Honora Protektanto, al la Urbestro, patronoj, kunlaborantoj kaj ĉiuj aliaj personoj, kiuj speciale laboris por nia afero.

Universala Kongreso de Esperanto estas manifestacio de internacia movado de Esperanto, la komuna lingvo homa. Nur per unu lingvo, pli ol 1.600 homoj el 40 malsamaj landoj kunvenas, parolas ĉiam unu saman lingvon sen interpretisto, sen tradukanto.

Ni vivas nuntempe en mondo de progresinta civilizo. Aeroplanoj kunligas rapide ĉiun angulon de la terglobo; radioj, televidoj k.a. faris la mondon kiel unu najbaron. Ekzemple, mi povis flugi de Tokio al Londono tra la norda poluso en nur 18 horoj. Sed spirita civilizo aŭ civilizo de la spirita flanko stagnas nun ankoraŭ en ne tute pro-

La solena inaŭguro de la 46-a U.K. Bonvenigas anglalingve la kongresanojn la Urbestro de Harrogate, s-ro Konsilanto Frank Allum. Esperanten interpretas Mag. W. Auld.

gresinta stato, ofte kvazaŭ en Mezepoko, kiam najbaraj landoj interbatalis. Rompi la stagnon kaj progresigi homan rilaton al unu internacia solidareco estas tasko de la nuna jarcento. Esperanto servas sendube al tiu ĉi laboro, donante komunan interkomprenilon al ĉiuj nacioj.

Mi volas vidi specialan signifon en nia 46a, en du punktoj : unue, ĝin karakterizas Arta Festivalo, kaj due ĝi havas kunvenon de infanoj. Arto mildigas la homan senton, pacigas la homan koron, kaj moligas nervan strecon. En Infana Kongreseto geknaboj parolas Esperanton, uzas ĝin sen dubo kaj sen kritiko. Se geknaboj en ĉiuj landoj de la mondo lernos Esperanton dum certa periodo en lernejoj, la mondo havos post 10 aŭ 15 jaroj Esperanton plene disvastiĝantan tra ĉiu direkto.

La 46a Kongreso havas multajn gravajn temojn diskutotajn. Mi deziras al vi, ke vi bonvolu labori en diversaj fakoj fervore, sed ĉiam en harmonio, en amikeca atmosfero kaj kun reciproka fido.

La sukceson de la 46a Universala Kongreso mi esperas kaj la sanon de vi, ĉiuj ĉeestantoj, mi kore deziras.

S-ro R. W. Hamilton, Prezidanto de L.K.K., bonvenigis la kongresanojn kaj deklaris, ke la britaj esperantistoj alte taksas la honoron kiun la Estraro faris elektinte Harrogate, la reĝinon de la anglaj kongresurboj, kiel kongresurbon.

La Urbestro de Harrogate, S-ro Konsilanto Frank Allum, bonvenigis nacilingve la kongresanojn en la nomo de la urbo kaj finis sian paroladon en Esperanto.

S-ro H. W. Holmes O.B.E., Vicprezidanto kaj aganta Prezidanto de U.E.A., tralegis leteron de UNESKO, kiu bedaŭrinde ne povis sendi sian observanton, sed notas la tagordon de la Kongreso kaj sendas saluton kaj bondezirojn.

F-ino M. H. Vermaas, direktorino de la C. O., tralegis kelkajn pli gravajn telegramojn kaj leterojn, antaŭ ĉio tiujn de Ludoviko Zamenhof, la nepo de la aŭtoro de Esperanto kaj de Prof. Edmond Privat, Honora Prezidanto de U.E.A.

Sekvis SALUTOJ DE REPREZENTANTOJ DE REGISTAROJ : Belgujo (S-ro G. Maertens), Germanujo (D-ro W. Herrmann), Hungarujo (S-ino Barbara Sereni Tot), Irano (ataŝeo Hamit Enayat), Jugoslavio (S-ro Petar Vukomanoviĉ), Nederlando (Inĝ. J. R. G. Isbrucker), Norvegujo (Kap. R. Bugge Paulsen), Svedujo (D-ro Ebbe Vilborg). Parolis ankaŭ en Esperanto la brita parlamentano S-ro Jones.

Post tio sekvis SALUTOJ DE REPREZENTANTOJ DE LA LANDAJ ASOCIOJ ALIĜINTAJ : Argentino (F-ino Rosa Scolnik), Aŭstrujo (S-ro F. Rentmeister), Belgujo (F-ino J. Terrijn), Brazilo (S-ro F. de Souza Almada), Britujo (S-ro V. Sadler), Bulgarujo (S ro A. Lakov), Danlando (Prof. P. Neergaard), Finnlando (S-ro V. J. Kostiainen), Francujo (S-ro Jack Rousseau), Germanujo (S-ro R. Hirsch), Italujo (S-ro J. Grattapaglia), Japanujo (Prof. H. Yagi), Jugoslavio (Prof. B. Popoviĉ), Kanado (S-ino V. Eichholz), Madagaskaro (S-ro L. Ramialison), Nederlando (S-ro E. de Wolf), Norvegujo (S-ro Otto Prytz), Novzelando (S-ro W. H. King), Pollando (Prof. D-rino H. Szablowska), Svedlando (S-ino Ester Andren), Svislando (S-ino A. Masé), Usono (S-ro Mark Starr).

Je la fino salutis REPREZENTANTOJ DE LANDAJ ASOCIOJ NEALIĜINTAJ kaj landoj sen organizita movado : Hungarujo (S-ro Julio Baghy), Irlando (S-ro L. OhUiginn), Israelo (S-ro B. Swarsenski), Maroko (S-ro Ch. Thollet), Meksikio (S-ro Havalos), Sudafriko (S-ro E. W. Woodruff).

Inter la programeroj okazis trifoje altnivela pianludo de la brita pianisto S-ro Alan Soulsby. Post la lasta muzika ero Prof. D-ro Ivo Lapenna faris la festparoladon, plurfoje interrompitan de fortaj aplaŭdoj, kiuj post la lastaj vortoj kreskis je ovacio. La ĉefaj partoj de la teksto sekvas ĉi sube. La inaŭgura solenaĵo finiĝis per komuna kantado de "La Espero".

MALGRANDA ELEGIO POR GIORGIO CANUTO

Vin vivantan mi honoris;
hele tagis tia nuno;
mortan, vin mi ne priploris.
Noktas. Kaj subiras suno.

Manon vi lastfoje svingis....
Vinodoras glas' malplena.
Vi strebadis kaj atingis.
Oras la falado grena.

Homojn ame vi pacigis.
Kreskas junaj olivarboj.
Al laboro vi instigis.
Daŭre varmas grizaj karboj.

Kontribuis vi al sci'.
Birdoj nestis — birdoj nestos....
Scion diskonigis vi.
Longe tiu scio restos.

Sur la tombo velkas laŭro,
kaj tretita ter' pasivas.
Ĉio ŝajnas daŭro, daŭro;
via verko vin postvivas.

Plena vivo, vivplenumo;
rozobero sekvas rozon.
De la luno, ĝen sunlumo.
Vi meritis la ripozon.

Marjorie Boulton

FESTPAROLADO DE PROF. D-RO IVO LAPENNA

(Laŭ notoj de la Gazetara Servo)

Jam la sesan fojon ni kongresas en la lando de la Britoj. En 1907 la 3-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en la glora Universitato de Kembriĝo, kie D-ro Zamenhof en rimarkinda parolado difinis la celojn de la Esperanto-kongresoj kaj akcentis ilian rolon kiel unu el la ĉefaj edukejoj por proksimigo kaj interfratigo de la popoloj. Nin gastigis ankaŭ la alia — ne la dua, ĉar same glora kiel Kembriĝo — mondfama Universitata urbo: Oksfordo. Ni kunvenis en la metropolo, en la multmiliona Londono, kaj ankaŭ inter la muroj de la blanka kaj eleganta Edinburgo, la ĉefurbo de Skotlando. Kaj tiam, en 1949, kun ankoraŭ freŝaj vundoj ricevitaj en la milito, vundoj venditaj, sed certe ne plene cikatriĝintaj, ni kolektiĝis en la marborda freŝo de Bournemouth, kaj nun ni komencas la laborojn de la 46-a Universala Kongreso en tiu ĉi eta — la plej malgranda kongresurbo en la historio de la Esperanto-Kongresoj — sed ĉarma, pura, trankvila kaj trankviliga Harrogate, prave nomata la ĝardenurbo de Britujo.

De 1907 ĝis 1961 sendube efektiviĝis multegaj ŝanĝoj en la karaktero de nia ĉiujara internacia renkontiĝo kaj koncerne la partoprenantojn kaj rilate la programojn, la taskojn solvotajn kaj la celojn atingotajn, sed unu afero restis la sama: la uzado de unu sola, neŭtrala lingvo, egala por ĉiuj kaj same proksima al ĉiuj. La fakto, ke Kongreso uzanta tian lingvon, vere internacian ne nur laŭ la nomo, sed ankaŭ laŭ la interna strukturo, laŭ la celo al kiu ĝi servas kaj laŭ la konsisto de la kolektivo, kies spirita proprieto ĝi estas, okazas en lando, kie naskiĝis kaj evoluis ĝis la plej alta nivelo de riĉeco la angla lingvo; meze de popolo, kies genio donis al la tuthomara kulturo tra tiu lingvo gigantojn de la formato de unu Shakespeare, aŭ Milton, aŭ Dickens, aŭ Shaw, de Hobbes, Adam Smith, John Stuart Mill kaj plejadoj da aliaj, havas nekontesteble unuarangan signifon por la afero de la Internacia Lingvo. Ĉiuj unuopuloj — oni asertas kaj solene proklamis milfoje — estas egalaj. Tamen, por ripeti en iom ŝanĝita senco tre konatan eldiron — iuj estas pli egalaj ol la aliaj! Kaj sur la tereno lingva en la hodiaŭaj internaciaj rilatoj la angla lingvo certe apartenas al la kategorio de la "pli egalaj", eĉ al tiu de la "plej egala"! Se, do, en la lulilo mem de la angla lingvo, en la kerno mem de la impona kulturo de la angla-lingvaj popoloj troviĝas klarvidaj personoj, eĉ relative granda nombro da ili, kiuj akceptis kaj parolas la Internacian Lingvon, tio konfirmas plej evidente unu el la fundamentaj tezoj favore al neŭtrala lingvo, nome ke tia lingvo malutilas al neniu, sed male prezentas senfinajn avantaĝojn — pure teknikajn, intelektajn kaj moralajn — por ĉiuj, inkluzivante eĉ popolon, kies lingvon estas abunde uzata ankaŭ en diversspecaj internaciaj kontaktoj. Prave diris D-ro Zamenhof en sia mesaĝo de la jaro 1904 okaze de la unua datreveno de la fondiĝo de la Londona Esperanto-Klubo:

> "Londono longe dormis, sed kiam ĝi vekiĝos, tio estos kiel vekiĝo de leono. Potenca voko iros el Londono kaj ĉiam pli kaj pli sonados kaj resonados en ĉiuj partoj de la mondo. Kun atento la popoloj aŭskultados la voĉon venantan el la potenca centro de la angle parolantaj regionoj".

Certe, ne la tuta Londono, nek la tuta brita popolo aŭdigis tiurilate sian voĉon. Sed en Londono plue laboras unu el la plej fortaj Esperanto-societoj en la mondo, kaj en Britujo troviĝas multaj aliaj. En tiu ĉi lando ni havas Universitaton kun unu el la plej malnovaj lektoratoj de Esperanto, dudekon da lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata kaj grandan nombron — multe pli grandan ol montras la oficialaj statistikoj — da bonaj esperantistoj. Koncerne la sindonemon, la brita esperantistaro apartenas al la plej oferema. En ĉiuj kampanjoj de la lastaj jaroj la britaj esperantistoj kutime kontribuis la ĉefan parton, kelkfoje eĉ duonon, dum la reston donis la tuta cetera esperantista mondo. Fine, ne estas eble ne akcenti, ke hodiaŭ la torĉon de la internacilingvaj poezio kaj prozo grandparte portas eminentaj poetoj, verkistoj kaj tradukantoj el tiu ĉi lando kaj ke inter ili la Centro de Esploro kaj Dokumentado havas kelkajn el siaj plej agemaj kunlaborantoj.

Dankon al la brita esperantistaro pro ĝia multflanka, abunda, materia kaj intelekta kontribuo al la Internacia Lingvo! Dankon al la kuraĝaj Jorkŝiraj geesperantistoj, kiuj kvankam dissemitaj tra la regiono, sukcesis kun la helpo de la K.K.S. kaj lia edzino, en harmonia kunlaboro kun la Estraro de U.E.A., organizi tiun ĉi kongreson. Dankon, tute apartan, al la lokaj aŭtoritatoj de Harrogate pro la afabla invito kaj la granda helpo donita al la Loka Kongresa Komitato.

En Britujo Harrogate estas konata kiel ripozejo, sanigejo, agrabla somerrestadejo, sed en la mondo, precipe en Eŭropo, ĝi famiĝis siatempe kiel unu el la pioniroj en la iama kampanjo de la t.n. angla-franca dulingvismo. Ne estas ĉi tie la loko, nek nun la momento por doni kritikan analizon de tiuj eraraj premisoj, sur kiuj baziĝis tiu ideo. Des malpli necesas tion fari, ĉar la afero, kiel ni klare antaŭvidis antaŭ kelkaj jaroj, tute malaktualiĝis kaj formortis malgraŭ la apogo, kiun la kampanjo siatempe ĝuis precipe en pluraj influaj francaj medioj kaj malgraŭ la konsiderin-

daj financaj rimedoj, kiuj troviĝis je ĝia dispono. Tute alia afero estas emfazinda. Harrogate vidis anglajn-francajn semajnojn kaj aliajn aranĝojn dè amikeco inter la du nacioj — afero per si mem salutinda kaj apoginda — en kiuj la abunde propagandata kaj reklamata anglafranca dulingvismo esprimiĝis ĝenerale tiel — mi mem tion konstatis — ke Francoj parolis france kaj Angloj parolis angle ! Nun kaj en la sekvantaj tagoj Harrogate povos sperti kaj mem konstati kion signifas vera dulingvismo, tiu dulingvismo, kiu ne celas nur du popolojn, sed ĉiujn naciojn; dulingvismo de egaleco kaj justeco por la tuta homaro : nacia lingvo kaj la Internacia Lingvo, nacia lingvo, tute egale ĉu ĝi apartenas al granda aŭ malgranda popolo, por ĉiuj bezonoj de komunikado interne de la koncerna popolo; la Internacia Lingvo, neŭtrala kaj tuthoma, por ĉiuj internaciaj rilatoj ekde la simpla konversacio inter du ordinaraj apartenantoj de malsamaj gentoj ĝis la plej altaj esprimiĝoj de la homa spirito en verkoj sciencaj kaj artaj.

Feliĉe, dank' al iniciato kaj persona laboro de Zamenhof mem kaj, poste, dank' al sindediĉo de multaj aliaj talentaj kaj kleraj laborantoj, kelkfoje eĉ kun geniaj trajtoj, jam kreiĝis kaj daŭre fortikiĝas vere internacia kulturo en la Internacia Lingvo, originala kaj traduka poezio, prozaj verkoj kaj dramoj, sciencaj traktatoj, disertacioj kaj artikoloj, ĉio ĉi kaj aliaj produktoj de intelekta kreado riĉigis la lingvon per ĉiam pli granda kultura enhavo, paralele evoluigis ĝin interne, altigis kaj firmigis ĝian prestiĝon en multaj medioj, objektive transformis ĝin en kulturlingvon. Tio siavice vastigis kaj daŭre vastigas la eblecojn de ĝia ĉiuflanka utiligo, sed, kio estas aparte akcentinda en tiu ĉi kunteksto, tute speciale por kulturaj interŝanĝoj.

Dum tiu ĉi Kongreso estas farata plia paŝo. Al la Kongreso estas ligita kiel ĝia konsista parto la Unua Internacia Arta Festivalo. Zamenhof iam revis pri fondo de teatra trupo, eble kun la sidejo en Parizo — kiel li skribis al Bourlet en 1903 — kiu prezentus dramojn aŭ almenaŭ dialogojn kaj kantojn. Nun en la Arta Festivalo estos ses teatraĵoj, kiujn ludos la Internacia Arta Teatro kun sidejo precize en Parizo kaj du aliaj trupoj. Ni aŭdos kantojn kaj kanzonojn de diversaj nacioj, prelegojn pri artaj temoj kaj demandoj en la Internacia Somera Universitato, deklamadojn de poemoj, oratoraĵojn de gejunuloj, legadon de verkoj premiitaj en la Belarta Konkurso. La Arta Festivalo, kiu, kiel montras la programo, konsistas ankaŭ el pluraj aliaj branĉoj, certe ne estas revuo de la kvintesenco de ĉio plej bona, kion povas hodiaŭ prezenti la Esperanto-Movado sur la arta kampo, sed same certe tiu unua provo, kies originalan realigon obstaklis multaj malfacilaĵoj, eĉ tiel manka kaj nekompleta, estas admirinda evento, kiu signifas plian ŝtupon supren en la evoluigo de la internacia kulturo. Samtempe ĝi plue larĝigos niajn horizontojn, riĉigos nin intelekte, helpos nin pli bone kompreni unu la alian, estimi kaj aprezi la kulturajn valorojn kreitajn en aliaj medioj kaj, rezulte, koncepti la mondon kaj la homaron pli unuece, kio ebligos transporti tiun konceptadon al niaj geamikoj, gekonatoj, samlandanoj.

Tiamaniere la Unua Internacia Arta Festivalo apogas alian gravan klopodon de Universala Esperanto-Asocio : la subtenon per la Internacia Lingvo al la granda projekto de UNESKO Oriento-Okcidento. La afero estas bone konata inter la esperantistoj, ĉar ĝi estis jam plurfoje diskutata en diversaj okazoj, ekzemple en la kongresoj de Mainz, Varsovio kaj Bruselo, kaj ankaŭ la Esperanta gazetaro dediĉis al ĝi sian atenton.

Estas superflue diri, ke longe antaŭ ol UNESKO lanĉis en 1956 tiun grandan, dekjaran projekton por antaŭenigo de reciproka aprezado de la kulturaj valoroj de Oriento kaj Okcidento, ni agis per niaj modestaj, preskaŭ nulaj, rimedoj, nehelpataj de kiu ajn, sed inspiritaj de niaj fido kaj idealismo, por esence sama celo. Eĉ pli, jam antaŭ ol ekzistis UNESKO, ni komprenis, ke ne temas nur pri la konatigo kaj proksimigo de tio, kion oni povas nur kondiĉe kaj kun rezervoj nomi "Oriento" kaj "Okcidento" sed ke necesas diskonigi kaj aprezigi reciproke ankaŭ tiujn kulturajn valorojn, kiuj kreiĝis en unuopaj naciaj lingvoj, precipe de la malpli grandaj popoloj en la kadro de Okcidento kaj en tiu de Oriento. Kaj ĉefe tiu kaj aliaj agadoj sur la kultura kampo, inkluzivante la junan originalan Esperantan literaturon, kaj la admirindaj rezultoj atingitaj en tiu sfero, igis la Ĝeneralan Konferencon de UNESKO en 1954 konstati la efikecon de Esperanto por la internaciaj intelektaj interŝanĝoj, kaj instigis en 1959 la saman organizaĵon deklari la aŭtoron de la lingvo, kiu ebligis tiun tutan imponan agadon, unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Malgraŭ tiu jam konata kaj parte eĉ rekonita rolo de Esperanto kiel instrumento de proksimigo de diversnaciaj kulturoj kaj kiel rimedo por kreado de tutmonda, universala kulturo, tamen Universala Esperanto-Asocio aktivigis siajn fortojn por doni specialan helpon al la menciita Granda Projekto de UNESKO, kiu, kvankam malpli larĝe konceptita ol estas la aspiroj kaj praktika agado de la Esperanto-Movado, tamen plene respondas al la celoj kaj idealoj de U.E.A. Rezulte okazis nombro da elstaraj aranĝoj, el kiuj aparte menciindaj estas la kulturaj semajnoj en Grésillon kaj Frostavallen, kaj la ĵus okazinta Seminario en Londono, ĉiuj dediĉitaj al pli bona komprenado de la kulturaj valoroj, civilizo kaj vivmaniero de diversaj popoloj kaj en Okcidento kaj en Oriento. Al tio aldoniĝas la nova libroserio Oriento-Okcidento sub la aŭspicioj de U.E.A. En la Esperanta gazetaro artikoloj diskonigis la kulturojn de Okcidento kaj Oriento. Aparte men-

ciinda estas la revuo "La Suda Stelo-Prometeo", revuo kiu kunfandiĝis el la antaŭaj jugoslavia "La Suda Stelo" kaj japana "Prometeo". Jen ekzemplo de efika kunlaborado en tiu sfero.

Tiu tuta parte spontana, sed grandparte planita, organizita, konscia utiligado de Esperanto por rompi la lingvajn barojn sur ĉiuj. niveloj ekde la plej bagatelaj personaj kontaktoj ĝis la plej altrangaj kulturaj interŝanĝoj, ĉiam kun la celo detrui la antaŭjuĝojn, dissemi novajn sciojn kaj konojn, evoluigi reciprokan respektadon, havigis al la Internacia Lingvo novan rekonon en tiu ĉi jaro. Pli ol 70 sciencistoj, politikaj gvidantoj kaj aliaj kvalifikitaj personoj, pluraj mondfamaj, el 17 landoj kandidatigis U.E.A. kiel reprezentanton de la tutmonda Esperanto-Movado al la Nobel Pac-Premio. La decido ankoraŭ ne estas farita, sed la fakto mem, ke tiel granda nombro da eminentaj personecoj el multaj landoj faris la proponon, estas per si mem honorigo montranta la respekton, kiun ĝuas U.E.A. pro sia laboro. La konstitucio de UNESKO diras iuloke, ke la militoj komenciĝas en la mensoj de la homoj kaj ke tial precize en la mensoj devas unue esti konstruataj la defendoj de la paco. Kvankam tiu aserto ne estas tute ĝusta, tamen multege da vero estas en ĝi. Kaj estas ĝuste tio, kion faras la organizita neŭtrala Esperanto-Movado. Ĝi helpas al la konstruo de la paco ne per senenhavaj sloganoj, nek per papage senpensa ripetado "ni estas por la paco", sed per pacienca, ĉiutaga, longjara, sistema, kelkfoje ege malfacila konstruado iom post iom, brikon post briko, de la bazoj por frateco de la popoloj en libereco kaj paco. Precize tial U.E.A. estas proponita al la Nobel Pac-Premio.

En tiaj cirkonstancoj maturiĝas ĉiam pli la kondiĉoj por la vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj. Jam preskaŭ du jarojn aro da personoj klopodas iniciati Interŝtatan Konvencion por laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj laŭ ĉio ŝajnas, ke baldaŭ oni povas komenci rikolti la unuajn fruktojn. Povas esti, ke jam fine de tiu ĉi kongreso estos eble komuniki interesajn atingaĵojn kaj anonci novajn planojn.

La tri ĝis nun tuŝitaj punktoj — Esperanto kiel arta esprimilo, kontribuo al la projekto Oriento-Okcidento, lernejoj — apartenas al la pozitiva flanko de la pesilo. La bildo estus neobjektiva kaj tial danĝere deformanta la realaĵon, se oni ne atentus ankaŭ la negativan elementon. Ĉiuj sukcesoj atingitaj en la preskaŭ 75-jara ekzistado kaj funkciado de la Internacia Lingvo havas kiel sian plej profundan radikon la fakton, ke ĝi estas vere internacia, kiel eble plej simpla en sia strukturo, riĉega en siaj esprimeblecoj, facile ellernebla. Tiu baza antaŭkondiĉo ebligis la relative rapidan disvastiĝon de la lingvo sur ĉiuj kontinentoj — iuloke pli intense, aliloke malpli — la akiron kaj ekregon de la lingvo fare de multaj, la vere majstran mastradon fare de malpli multaj precize tiel, kiel okazas en ĉiuj lingvoj. Alivorte, la genie pripensita projekto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta kolektivo, ĉar ĝi estis uzata ne nur skribe, sed ankaŭ parole, ne nur por poezio kaj literatura kreado, sed ankaŭ por legado de tiu literaturo, por ĝuado de tiu poezio, por reciproka komunikado. Sen la plena vivanteco de la lingvo, Esperanto estus havinta la saman sorton de mortnaskito, kiun havis ĉiuj aliaj projektoj antaŭ ĝi kaj post ĝi. La vivanteco de la lingvo estas la plej granda trezoro, kiun ni havas kaj kiun tial ni devas gardi kaj konservi kiel la absolute plej valoran, kiel la plej potencan armilon en niaj estontaj klopodoj. Bedaŭrinde lastatempe manifestiĝis tiurilate kelkaj maltrankviligaj signoj. Kelkaj Esperanto-organizaĵoj, inkluzive plurajn lokajn grupojn, tro ofte uzas en la kunvenoj aŭ kunsidoj la nacian lingvon. Kutime oni tion faras aŭ pretekstas tiel fari pro la komencantoj. Efektive, ne nur pro la bonaj komencantoj de la lingvo, sed precize pro la komencantoj oni devus ĉiam, en ĉiuj organizaĵoj, praktiki nur la Internacian Lingvon. Ili devas esti ne nur la disvastigantoj de Esperanto, sed ankaŭ la centroj, en kiuj la lingvo daŭre vivas kaj evoluas. Se oni deziras bone ellerni fremdan lingvon, oni post longa studado vizitas la landon en kiu la lingvo estas parolata kaj restas tie kiel eble plej longe. Miloj da gejunuloj, precipe da junulinoj, ĉiujare venas al tiu ĉi lando, ne malofte peze kaj ŝvite laboras dum multaj monatoj nur por iom plibonigi sian scion de la angla. Kien iros la miloj, kiuj ĉiujare eklernas la Internacian Lingvon por praktiki ĝin kaj tiel perfektigi sian scion? Kie estas la lando, en kiu la Internacia Lingvo estas parolata? Ĝi ne ekzistas, sed ĝin povas kaj devas anstataŭigi niaj organizaĵoj, unuavice la lokaj Esperanto-societoj.

En ili estu aŭdata ĉiam kaj en ĉiuj okazoj, ekde la oficialaj programoj, kiuj estu kiel eble plej altnivelaj, ĝis la plej oridinaraj konversacioj, sole la Internacia Lingvo. Nur tiamaniere estos eble atingi, ke la miloj da personoj, kiuj ĉiujare komencas lerni Esperanton, transformiĝu kiel eble plej baldaŭ en bonajn uzantojn de la lingvo. Tio siavice fortigos ĉiujn niajn organizaĵojn, helpos al la kreskigo de la Esperanta literaturo, faros la kunvenojn, konferencojn kaj kongresojn pli interesaj, unuvorte fortikigos kaj antaŭenigos la tutan Esperanto-Movadon. Ankoraŭ pli forta kaj ankoraŭ pli unueca ĝi povos atingi novajn sukcesojn kaj novajn rekonojn sur ĉiuj tri niveloj: la internacia la landa kaj la loka. Tiamaniere, agante harmonie kaj kunlabore sur la tri niveloj, helpante unu la aliajn kaj helpataj unuj de la aliaj, ni iros antaŭen ĉiam pli firme kaj per ĉiam pli grandaj paŝoj de unu venko al la alia ĝis ni atingos la finan celon: la enkondukon de la vivanta, alte evoluinta Internacia Lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn.

LA UNUA INTERNACIA ARTA FESTIVALO

TEATRO

Dimanĉon, la 6an de aŭgusto 1961: JUGOSLAVIAJ FOLKLORAJ DANCOJ PREZENTITAJ DE LA ENSEMBLO "BRANKO CVETKOVIĆ".

Jam tre frue oni serĉis lokon en la Teatro de Harrogate, kaj iom antaŭ la komenciĝo ĝi estis plenplena. Se ni scias la fakton ke jugoslava folkloro ĝuas mondfamon, ni ankaŭ povas kompreni tiel grandan intereson por la prezentado de la kulturarta societo "Branko Cvetković" el Beogrado.

La programo kiun la grupo prezentis por la kongresanoj konsistis el plej interesaj dancoj el diversaj regionoj de Jugoslavio. La gvidanto de la grupo s-ro Buha enkonduke prezentis la grupon kaj post tio la dancistinoj en pitoreskaj popolaj kostumoj ĵetis de sur la scenejo florojn al la publiko simboligante tiel sian saluton. Sekvis 16 programeroj unu pli interesa ol la alia, kaj ĉiu salutita per tondra aplaŭdo. Oni vidis dancojn i.a. el la regionoj de Banat, Niŝ, Bunjevci, Homolje, Rugovo kaj Vranje, el Makedonio, Slovenio, Dalmatio, akompanatajn de kantado, popolaj instrumentoj aŭ tamburado. Por ĉiuj dancoj la dancantoj prezentiĝis en aliaj folkloraj kostumoj. La movoj, jen graciaj, jen batalemaj kaj fulmrapidaj, seninterrompe katenis la strečan atenton de la publiko. Je la fino la ĝenerala sekretario de U.E.A., Prof. Lapenna, esprimis en Esperanto kaj en serbokroata la dankon de ĉiuj ĉeestantoj pro la altnivela prezentado.

☆

Lundon, la 7an de aŭgusto, 1961 : ADVOKATO PATLENO, triakta teatraĵo de nekonata mezepoka franca aŭtoro. Ludis la Internacia Arta Teatro sub reĝisorado de S. Flego.

Emilija Lapenna skribas :

Prezenti komedion el la XV-a jarcento al la publiko de la XXa jarcento estas kuraĝo, kiun malofte esprimas eĉ la profesiaj teatroj. Flankenlasante la demandon, kio igis la IAT elekti ĝuste tiun farson, oni devas admiri la energifonton de la aktoroj, kiuj en la malfacilaj cirkonstancoj, en kiuj laboras IAT, sukcesis prepari por prezentado tiun malnovan versokomedion, en kiu la vorto estas la ĉefa elemento, ne la ideo kaj ne la dramagado.

La ideo de la farso estas naivece simpla : Senmona advokato superruzis drapvendiston, forprenante de tiu drapopecon senpage, sed poste lin mem superruzis ŝafisto.

La tuta dramagado konsistas el konversacio inter la geaktoroj. Ĉio tio evoluas en simpla, sed sprite solvita sceneja aranĝo adaptita al la epoko en kiu ekestis la farso PATLENO. Sed la konversacio ne estas simpla. Ĝi estas en versoj. Versoj de la malnova franca lingvo, bonege tradukitaj, en rimoj, de Srĝan Flego. La lingvo, la versoj, la rimoj, estas la plej elstara kvalito de tiu prezentaĵo, kiu ankaŭ en aktorado kaj la reĝisora aranĝo atingis la nivelon de la profesiaj prezentaĵoj. La reĝisoro por vivigi la konversacion iom longan kaj iom malproksiman al la hodiaŭa rigardanto, forte akcentis la farsecajn scenojn, tiel ke la nokta vazo ludas gravan rolon kaj la du komentantoj, kiujn bonege rolis Eta Bartolazzi kaj Mladen Šerment, estis nur en vortoj komentantoj, kaj en la masko kaj aktorado — komediantoj. Ambaŭ bone solvis sian aktoran taskon kaj la burleskaĵojn sukcese adaptis al la etoso de la farso.

La tradukinto Srĝan Flego sprite solvis la partojn de la teksto, verkitajn en antikvaj francaj dialektoj, per diverslingva sensenca vorttorento kaj fuŝ-maniere prononcita Esperanto, kio vekis gajesprimon ĉe la spektantoj.

Tamen PATLENO, kvankam ĝi prezentas la plej malfacilan ĝis nunan enscenigon de la IAT, kaj nepre apartenas al la plej grandaj sukcesoj de tiu nova, sed jam renomita aktora kolektivo, estas pli valora kontribuaĵo al la esperanta traduka literaturo, ol helpo al la esperantistaj teatraj trupoj. Kiel legaĵo, pro la bone tradukitaj versoj el la antikva franca lingvo kaj spritaj lingvaj solvoj, ĝi estos ĉiam frandaĵo por literaturamantoj, sed enscenigo pro la longa rimita teksto kaj neaktuala enhavo renkontos pli da kontraŭstaro ol da entuziasmo.

Aktoro Srĝan Flego brilis en la rolo de PATLENO, lin kaj liajn kolegojn regalis la aplaŭdo sincera kaj arda, sed tradukisto Srĝan Flego, per traduko de PATLENO, akiris renomon pli longedaŭran ol estas eĉ la plej arda aplaŭdo post la sukcesa prezentaĵo.

Merkredon, la 9an de aŭgusto, 1961 : OKUNI KAJ GOHEI, unuakta dramo de Zyun'itiro Tanizaki, el la Tokugawa epoko (1603-1868), prezentita de amatora trupo el Londono; kaj LA URSO, komedio en unu akto, de Anton Ĉehov, prezentita de amatoroj el Bristolo, kun helpo de Mladen Šerment.

Marjorie Boulton skribas :

La dramo le Zynitiro Tanizaki estis por la vasta plimulto de tiuj kiuj plenplenigis la teatron, io tute ekzotika. La moralaj konvencioj (ekzemple, de socio, en kiu venĝo estis virto), la formoj de ĝentileco kaj edukiteco kaj ankaŭ la teatraj konvencioj, estis neatenditaj. La menso de okcidentano, kaj tre verŝajne eĉ de nuntempa japano, devis alkutimiĝi. Sed Elsa Rapley (Okuni), John Wells (Gohei) kaj Victor Sadler (Tomonozyô) multe provludadis antaŭ tiu prezentado, kaj enigis sin tre sincere en tiun ekstreme fremdan medion. Helpis ilin la neordinare lerta ŝminkado, kiu kvankam



La esperanta flago brave flirtas sur la urba teatro en Harrogate.

La Internacia Arta Festivalo : Japanan dramon "Okuni kaj Gohei" prezentis amatora trupo el Londono. Rolis s-ino E. Rapley, s-roj J. C. Wells kaj V. Sadler.



La Internacia Arta Festivalo : La Internacia Arta Teatro sub reĝisorado de S. Flego, sukcese prezentis la mezepokan francan farson "Advokato Patleno".

La Internacia Arta Festivalo : La kulturarta societo "Branko Cvetković" regalis la kongresanojn per folkloraj muziko kaj dancoj el la diversaj regionoj de Jugoslavio.

verŝajne tre malagrabla kaj laciga por la geaktoroj, tute aliigis iliajn tipe anglajn vizaĝojn.

La nuna raportanto ne kapablas juĝi ĉu tiu ĉi prezentado fakte reprezentis korekte la konvenciojn de la tiama japana teatro kaj la intencojn de la aŭtoro. La traduko, farita de Teruhiko Isiguro, fluis glate kaj nature. La geaktoroj certe donis impreson de io tute fremda, ekzotika, ege stilizita kaj kortuŝe bela, ĉar tra la stilizado, la fremdeco, la aliepokaj konvencioj brilis kaj brulis komplikaj homaj emocioj, la suferado de du viroj, kiuj agis malnoble sed konsciis pri sia propra malnobleco, de sentema virino, kies relativa pasiveco ne malebligis fortajn emociojn. Victor Sadler, kiu estas fakulo pri psikologio, verŝajne plej profunde studis sian rolon laŭ psikologia vidpunkto, kaj igis la internan tragedion de malsamurajeca japano ne nur komprenebla, sed tragika. Sed la delikata, kvazaŭ rompebla beleco kaj sentemo de Okuni, kaj la vireca forto subfosita de internaj konfliktoj ĉe Gohei, ankaŭ emociis. La tri talentaj kaj videble multe laborintaj amatoraj geaktoroj sukcesis en tiu fremdega stilo, prezenti al ni intensajn, komplikajn, kredeblajn emociojn sen bombasta bruego. Estis dramo pri animoj, kie la glavofrapo estis negrava, kie koro kaj honoro estis pli signifoplenaj. Estas aparte malfacile prezenti dramon, kiu tiel malmulte dependas de movoj, agoj, okazantaĵoj. Des pli laŭdinda estis la sukceso de la prezentado.

Post tiu dramo de konfliktoj kaj kompato, la bonega farso "La Urso" de Ĉeĥov povis esti nur ia freŝiga bagatelo. La prezentado iĝis tre malfacila, ĉar unu el la tri geaktoroj lastmomente malsaniĝis; sed, sen la anonco, la aŭdantaro ne estus sciiĝinta pri tiu malhelpo, ĉar ĉio iris glate, rapide, amuze; (M. Ŝerment el Internacia Arta Teatro lastmomente ensaltis kaj rolis Luka, kiun devis ludi Leigh Preston). Entute kontentiga kaj neordinara programo.

☆

Ĵaŭdon, la 10án de aŭgusto, 1961 : LA HOMA VOĈO, unuakta teatraĵo de Jean Cocteau, kaj LA RESPEKTINDA P..... de Jean-Paul Sartre, ambaŭ en traduko de Roger Bernard, prezentitaj de la Internacia Arta Teatro.

William Auld skribas :

Mi estas en kelka embaraso. Kelkfoje tro facile fluis laŭdvortoj pri Esperantaj aranĝoj. La publiko avidas recenzojn pli kritikemajn; sendube la aktoroj de la Internacia Arta Teatro danke akceptus helpemajn sugestojn. Pasis apenaŭ unu horo de kiam falis la kurteno post prezento de "La Homa Voĉo" kaj "La Respektinda P.....", kaj tiun tempon mi utiligis cerbumante por trovi kritikindan punkton en la prezentado. Pardonpete, mi malsukcesis. La elekto de la prezentotaj pecoj estis perfekta; precipe "La Respektinda P.....", kun sia neta sinteno al la interrasa krueleco kaj al la fariseismo, estis tre taŭga ĝuste por nia internacia publiko. La tradukoj en Esperanton de Roger Bernard estis mirindaĵoj de flua, natura kaj sorĉe bela parolado; dum la prezentado oni (kio signifas ne nur la subskribanto sed ankaŭ multaj aliaj poste alparolitaj) tute forgesis, ke la lingvo uzata estas Esperanto, ia "artefarita dua lingvo", sed streĉe sekvis la okazaĵojn kvazaŭ en "lingvo ensorbita kune kun la patrina lakto". Tio ŝuldiĝis kompreneble ankaŭ al la aktoroj, ĝisostaj esperantistoj, kies enroliĝo estis tute konvinka, centprocenta kaj - se temas pri profesia kapablo - nepre sur la unua rango. Se ni aldonas, ke la enscenigo, rekvizitoj kaj ĉiuj teĥnikaĵoj estis tiel same unuarangaj, restas jam nenio, kion oni povus malfavore kritiki.

La aliaj rolintoj pardonu al mi, se mi aparte laŭdas la du aktorinojn, Jana Ravŝelj kaj Eta Bartolazzi. "La Homa Voĉo" de Cocteau estas granda fortostreĉo por la sola rolantino; resti sola sur la scenejo dum 45 minutoj, ne enuigante la rigardantojn sed male tenante streĉe ilian intereson senin-terrompe - tio estas unu el la plej malfacilaj taskoj al kiuj povas alfronti aktorino. Tute sincere mi ne atendis, ke f-ino Ravŝelj pri tio povos sukcesi, kaj same sincere mi kun la plej granda plezuro raportas, ke ĝuste tion ŝi tamen sukcesis fari. Diri ke ŝi estas gratulinda estas jam tro pale esprimite.

La rolo de Lizzie en "La Respektinda P....." de Sartre estas alia tute malfacila rolo; iasence de ŝia sukceso dependas la sukceso de la dramo, ĉar unu falsa tono, unu malfeliĉa movo, kapablus detrui la dinamismon de la dilemo. La rolado de Eta Bartolazzi estis pli ol senriproĉa : ĝi estis virtuoza, majstra - mi opinias, ke ne superebla. Sed tio jam ŝajnas maljusta al la aliaj. Mi ripetas : ĉiu ludis tutperfekte, tutkonvinke, sian rolon, tiel ke la tuta prezentado estis ne forgesebla sperto por ĉiu alestanto.

Por ĉiu alestanto. Jes, fine mi trovis mian kritikindan punkton. Mi profunde bedaŭras, ke alestis tiel relative malmultaj el la publiko. Mi taksas, ke ĉeestis malpli ol unu kvarono - certe ne pli - el la kongresanaro. Nu, la aliaj maltrafis belan travivaĵon; sed la afero iras pli profunden ol tio. Se, laŭ la vortoj de D-ro Lapenna, la esperantistoj ne scias ĝuste taksi la kulturajn valorojn kreitajn en Esperanto, ili fine sukcesos pereigi nian aferon. Se per sia indiferenteco ili senkuraĝigos tiujn samideanojn, kiuj dediĉas elstarajn talentojn al plivalorigo de la internacilingva afero, tiaj homoj nin baldaŭ forlasos, kaj Esperanto estos tiom pli malriĉa. Ni havas vere altnivelan trupon de profesiaj geaktoroj. Espereble la famo pri ilia hodiaŭa grandioza prezentado tiel disvastiĝos, ke estontece ili estos subtenataj de la publiko laŭ iliaj efektivaj meritoj !

Poste evidentiĝis, ke kaŭzis la malgrandan nombron de ĉeestantoj ĉefe la fakto, ke la kongresanoj ne estis

revenintaj de la tuttagaj ekskursoj, kiam komenciĝis la teatra prezentado. La libervolaj teatraĵoj estis en la programo anoncitaj je la postkongresa sabato posttagmeze. Pro la antaŭvidebla forveturo de la kongresanaro antaŭ tiu indikita tempo, oni anoncis dum la Kongreso la translokigon de tiuj teatraĵoj al la ĵaŭdvespero. Certe pli inda enprogramigo por la altnivelaj prezentadoj de I.A.T., se ne la ekskursoj estus revenintaj kun konsiderinda malfruiĝo . . . La sperto estu instruo por venontaj kongresoj. **Red.**

☆

Vendredon, la 11-an de aŭgusto, 1961 : ARTO KAJ VIVO, sub gvido de s-ro Roland Dupuis prezentis ĝuindan programon, en kiu partoprenis 29 amatoroj de 9 nacioj plus granda ĥoro. La spektantoj preskaŭ plenigis la teatron. La programo estis jena; 1. Pilgrimsento (ĥorkanto), 2. En monaĥeja Ĝardeno (sceno kaj kanto), 3. El la Pasia Vivo de Franz Liszt (teatraĵo kun muziko). Plenaĝa ĥoro kantis Esperantan tekston laŭ la muziko Tannhauser de Wagner. Post tio Infana ĥoro kantis en dramа sceno laŭ muziko de Ketelbey. Fine la granda rolantaro prezentis scenojn el la vivo de la komponisto F. Liszt, honore al lia 150-a datreveno.

Ĉi tiun programon aranĝis kun granda sinofero la pianisto S-ro Roland Dupuis el Svedujo. Ĝi estis nur parte antaŭ-provita antaŭ la Kongreso. Oni devis plenigi la ceterajn rolojn kaj kunmeti la tuton dum la Kongreso. Do ne estis eble prezenti poluritan programon. Tamen dank' al la grandega energio de S-ro Dupuis kaj la sperta subteno de Frank Merrick kaj aliaj helpantoj diversflankaj, la prezentadoj sekvis sufiĉe glate por doni plezuron al la ĉeestantaro. Oni ege ŝuldas kiel ĉiam al la granda kaj sperta helpo de la profesiaj scenejaj laborantoj de la teatro Royal Hall.

☆

Vendredon, la 11-an de aŭgusto, 1961 : MEDITERANEO KANTAS. Junulara Kantĥoro el Ljubljana, sub gvido de ĥorestro Vili Sĉuka.

La belegaj junaj voĉoj, kantantaj sen instrumenta akompano, prezentis kantojn hispanajn, francajn, italajn, jugoslaviajn, israelajn kaj libanajn, kiuj ravis la publikon.

Je la fino oni kantis tri kantojn (Ho mia kor' laŭ la vortoj de L. Zamenhof, Milita fablo de J. Baghy kaj estona Tuljak) honore al 75-jara jubileo de la konata esperantista verkisto Julio Baghy. Tiuj tri eroj estas komponitaj de ĥorestro Vili Sĉuka, el kiuj unu estis kantata en nacia lingvo, dum ĉiujn aliajn kantojn oni kantis en Esperanto.

Je la fino D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario de UEA, je la nomo de LKK kaj Estraro de UEA dankis pro la elekto de la programo, kaj deklaris, ke li apenaŭ povas esprimi la sentojn de la ĉeestantoj por danki la ĥoron, kiu donas la pruvon, ke ankaŭ hodiaŭaj gejunuloj interesiĝas pri la Internacia Lingvo kaj scias ĝin uzi.

ALIAJ FESTIVALAJ ARANĜOJ

HORETO DE POEZIO

Mardon okazis en la Suna Pavilono konkurso pri deklamado kaj post tio konkurso pri sonbendoj. Prezidis Prof. G. Waringhien, ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj. Kvar deklamantoj partoprenis la konkurson de deklamado. Komisiono de poetoj aljuĝis la unuan lokon en la konkurso al F-ino Carla Sfardini (Italujo) pro belega deklamado de la elĉerpaĵo "Paolo kaj Francesca" el la 5a kanto de "Infero" de Dante, kiun la aŭskultantaro arde aplaŭdis. La duan lokon okupis S-ino Maude Collins el Britujo, kaj la trian S-ino Eichholz el Kanado. Dum la juĝado oni aŭskultis belegajn elĉerpaĵojn el "La Infana Raso" de William Auld per sonbendo de Radio Varsovio. Poste la poetoj Baghy, Marjorie Boulton, Sadler kaj Auld deklamis po unu sian poemon.

ORATORA KONKURSO

Ĝi okazis merkredon en la Reĝa Banejo sub prezido de Prof. G. Waringhien en ĉeesto de pli ol 300 kongresanoj (plenplena salono). La konkursantojn prijuĝis la prezidanto kun du membroj de la Komisiono : Emilija Lapenna kaj Gunther Becker. La prezidanto anoncis 9 kandidatojn, kiuj konkursis en la Oratora Konkurso : D-ro Mario Saler (Italujo), Diccon Masterman (Anglujo), Slobodan Zlatnar (Jugoslavio), Eliza Weide (Germanujo), Giuliano Turone (Italujo), Humphrey Tonkin (Anglujo), Joachim Moritz (Germanujo), Roman Dobczinski (Pollando), Krin Masterman (Anglujo).

La plej multaj elektis la temon pri la dezirata rolo de la junularo en la movado. Dum pli ol unuhora daŭro, ĉiuj konkursantoj montris sian lerton kaj la juĝkomisiono tuj proklamis la rezulton. La 1-a premio : Humphrey Tonkin (Anglujo), por la temo "Dezirata rolo de junularo en la Movado"; la 2-a Eliza Weide (Germanujo) por la temo "En kiu senco arto estas internacia ?; la 3-a Giuliano Turone (Italujo) por la temo la sama kiel la 2-a premiito. La prezidanto gratulis al ĉiuj tri premiitoj kaj anoncis, ke la diplomon ili ricevos dum la Solena Fermo de la Kongreso. La nomo de la unua premiito estos engravurita sur la arĝentan pokalon "Ivo Lapenna".

BELARTA KONKURSO

Merkredon, tuj post la Oratora Konkurso sekvis la Belarta Konkurso. La anstataŭanta sekretario, Mag. William Auld, anoncis la rezultojn de la juĝado farita de Internacia Komisiono : —

Branĉo Originala Poezio

1. S-ro Alvaro de Orriols, Francujo, pro "La Akcidento".

2. S-ro Albert Samyn, Belgujo, pro "Junia Pluvo".
3. S-ro A. Sándor Czászár, Hungarujo, pro "Majnokta Serenado".

Honora Mencio :

S-ino Eli Urbanová el Ĉeĥoslovakio, pro "Ombroj de la estinteco VII", kaj S-ro Jiři Kořínek el Ĉeĥoslovakio, pro "Por unu paĝo".

Brancxo Tradukita Poezio

1. S-ro Albert Samyn, Belgujo, pro "Irisa".
2. La sama, pro "Al la poetoj".
3. S-ro Henry Fridén, Norvegujo, pro "La klifoj ĉe Dovro".

Honora Mencio :

S-ro Victor Sadler, Britujo, pro "Plendo de Monaĥino", kaj S-ro Mijamoto Masao, Japanujo, pro "Utaoj de Yosano Akiko".

Brancxo Originala Prozo

1. S-ro Váňa Vladimir, Ĉeĥoslovakio, pro "Kiel ni mortigadis leporon por la antaŭkristnaska vespermanĝo".
2. S-ro Tibor Sekelj, Jugoslavio, pro "Kolektanto de Ĉielarkoj".
3. S-ro Váňa Vladimir, Ĉeĥoslovakio, pro "Kiel mi eniris Parnason".

Honora Mencio :

S-ro Albert Samyn, Belgujo, pro "La subjektiva kritiko", kaj S-ro Mijamoto Masao, Japanujo, por "La kaptito'.

Brancxo Originala Dramo

1. F-ino Marjorie Boulton, Britujo, pro "La eta estonteco".
2. Ne aljuĝita.
3. S-ro Albert Samyn, Belgujo, pro "La afero Wieck".

Kongreslanda Brancxo

1. S-ro Victor Sadler, Britujo, pro "Memoremo" de Emily Brontë.

La Premion "Nova Talento" oni ĉijare ne aljuĝis, ĉar la novaj talentoj ricevis premiojn en aliaj brancxoj kaj sekve ne estis allaseblaj.

"AŬTORO DE LA JARO". La titolon "Aŭtoro de la jaro" kaj la Diplomon kaj Arĝentan Spronon de KOKO ricevis ĉijare John Francis pro sia verko "VITRALO". La aŭtoro ne povis ĉeesti la Kongreson, sed li dankis la eldonejon per letero.

En la fino, la anstataŭanta sekretario esprimis grandan dankon al la peranto por la Belartaj Konkursoj, s-ro King el Bristolo, pro lia sindona laboro, sen kiu la konkursoj ne povus funkcii.

FILMOJ

En la kadro de la Arta Festivalo estis montritaj jenaj filmoj kun sonkomentarioj en Esperanto : "Pri la Varsovia Kongreso"; "Londona Kamparo"; "Jen Aŭstralio"; "Skota Montaro"; "La Lag-Regiono"; "Flugmaŝinmotoro Orfeo de Bristol-Siddeley"; "La koro de Anglujo"; kaj "Stelo super Varsovio".

Internacia Arta Festivalo : Parto el la ekspozicio de pentraĵoj de Eupremio Lo Martire.

KONKURSO : AFIŜOJ

Ekspoziciitaj dum la Kongreso estis preskaŭ 100 projektoj de propaganda afiŝo. La fina juĝo en la konkurso ne estis farita dum la Kongreso, ĉar la ĉar la juĝantoj deziris diskuti la teĥnikajn eblecojn kun la presisto de UEA, s-ro Zwagers, en Roterdamo.

KONKURSO : FOTOJ "LA HOMARO"

Kvankam la partopreno estis malgranda laŭnombre, la kvalito de la alvenintaj verkoj estis kontentiga, kaj ili formis belan ekspozicieton. Sendube en la venontaj jaroj pli multaj fotistoj kaj fotoamatoroj partoprenos. Premiitaj estis la verkoj : 1-a, Sen titolo, de Tadeusz Kowalski; 2-a, "Je aŭroro kapoj falos", de Tibor Sekelj; 3-a, "Kiel vi fartas 1" de Tadeusz Kowalski. La premiitaj verkoj estos publikigitaj en posta numero de "Esperanto".

La Internacia Arta Festivalo : La bildo montras nur parton el la multnombraj projektoj de propaganda afiŝo ekspoziciitaj en la Kongresejo.

EKSPOZICIOJ

En la akceptejo la kongresanoj povis ĝui ankoraŭ du belajn ekspoziciojn. La konata itala artisto kaj esperantisto Eupremio Lo Martire montris specimenojn el sia verkaro. Aparte interesa por ni estis lia portreto de nia mortinta Prezidanto, Prof. Giorgio Canuto. Krom tio oni muntis ekspozicion de japanaĵoj : fotoj pri la vivo kaj popolo de Japanujo, kaj kolekto de klasikaj japanaj lignogravuraĵoj.

☆

PRELEGO PRI BEETHOVEN

Fine, en la kadro de la Festivalo prezentiĝis "Renkonto kun la Eterna Beethoven", lumbilda prelego kun piana akompano de la pianisto R. Dupuis, kiu estis tre varme akceptita de la publiko.

La konata samideana itala artisto Eupremio Lo Martire havis ekspozicion de siaj verkoj en la kadro de la Internacia Arta Festivalo. Maldekstre oni vidas lian portreton de nia karmemora Prezidinto, Prof. D-ro Canuto; la Komitato de UEA decidis aĉeti kopion de la portreto por la Asocio.

LA INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

Sabaton, la 5an de aŭgusto, 1961, en la Reĝa Banejo, okazis renkontiĝo inter la Rektoro de la I.S.U., Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro en la Universitato de Liverpool, kaj la prelegantoj de la nunjara I.S.U.

La unua prelego de la I.S.U. okazis dimanĉon, la 6an de aŭgusto, sed antaŭe okazis agrabla ceremonio. La redaktoro de la grava revuo "Esperantologio", D-ro Paul Neergaard, prezentis al la prelegonto, Prof. G. Waringhien, okaze de ties 60-jara datreveno, specialan numeron de "Esperantologio", kiu enhavas eseojn el diversaj manoj dediĉitajn al tiu datreveno. Prof. Waringhien dankis pro la donaco, kiu, li diris, estis la plej granda honoro, kiun li ĝis tiam estis ricevinta en sia vivo.

Tuj poste Prof. Waringhien prelegis pri la temo : *"Kien la arto ?"*. Li klare montris, ke la arto ne estas io aparta de la reganta sociordo kaj la aktualaj sociaj ideoj kaj konceptoj, sed male reeĥas ilin. Ekde la klasika mondkoncepto en literaturo kaj pentroarto, li kondukis nin paŝo post paŝo tra la romantismo, simbolismo, surrealismo k.s., ĝis la hodiaŭo, kun ĝia agnosko de la neracio. Li montris, kiel la t.n. "moderna" arto evoluiĝis grade el la pli fruaj konceptoj, sekve de la ŝanĝiĝantaj kaj plilarĝiĝantaj konceptoj pri la universo kaj la rolo de la homaro. Kvankam li mem bedaŭris la formojn, kiujn prenis la arto en la pasintaj jardekoj, tamen li opiniis necese, kompreni ilin kaj la manieron de ilia ekestiĝo.

Lundon matene je la 9-a horo en hotelo Majestic Prof. D-ro Ivo Lapenna prelegis pri la temo *"La parolarto en la Internacia Lingvo."* Enkonduke la preleganto akcentis, ke jam kiel juna gimnaziano li havis la okazon publike paroli, sed neniu instruis al la lernantoj la fundamentojn de la parolarto. Jam tiam li revis skribi verketon pri la temo, sed tiu deziro povis realiĝi nur en 1950, kiam aperis lia libro "Retoriko". Li senkulpigis sin pro la fakto, ke verŝajne li devos ripeti aferojn, kiujn jam entenas tiu verko, precipe ĝia dua eldono. Poste la preleganto pritraktis kelkajn fundamentajn nociojn, tute speciale la diferencon inter la elokventeco, parolarto kaj retoriko.

Parolante pri la internacilingva parolarto li unue prezentis ĝian historion, kiu komenciĝas per la paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof en la universalaj kongresoj. La esperantlingva parolarto, kvankam ĝi de tiam konsiderinde evoluis, plue restas la plej neglektata arta branĉo, kiu esprimiĝas per la lingvo. Eble tial ĉar ĝi starigas severajn postulojn kaj por la oratoro kaj por la publiko. Prof. Lapenna prezentis kelkajn specialajn problemojn, kiujn renkontas esperantlingva oratoro : ofte devo paroli en fremda medio, nekono de la publiko, nesufiĉa scio pri la kutimoj de tiu medio. Kompreneble la oratoro devas perfekte regi la Zamenhofan Esperanton kaj same tiel la publiko devas konsisti el bonaj konantoj de la lingvo. Nur tiamaniere povas ekesti kaj evolui

tiu konversacio inter la oratoro kaj publiko, tiu necesa kontakto, kiu estas esence grava por bona oratorajo. Ĉiu parolado — eĉ la plej malgranda kaj ŝajne sensignifa — devas esti antaŭpreparita, en kazoj de urĝeco eĉ dum nur kelkaj sekundoj. Neniam oni komencu paroli, se antaŭe oni ne scias precize kion oni devas diri.

La preleganto emfazis la gravecon de absolute korekta kaj klara prononcado kaj atentigis pri kelkaj plej gravaj eraroj kiujn faras esperantistoj de diversaj nacioj ankoraŭ ne sufiĉe ekregintaj la lingvon. Poste li parolis pri la maniero akcentadi unuopajn vortojn en la frazo por nuancigi la ideon. Tion oni atingas aŭ per fortigo aŭ per malfortigo de la voĉo, per paŭzetoj aŭ per renverso de la kutima vortordo. La ekzisto de aparta signo por la akuzativo en Esperanto, la principa libereco de la frazkonstruo faras la Internacian Lingvon tre taŭga instrumento de la parolarto. La preleganto mem faris paroladojn en kvin lingvoj pri plej diversaj temoj, sed, li asertis, el ĉiuj tiuj lingvoj li pleje ŝatas precize la Internacian, ĝuste pro ĝiaj elstaraj kvalitoj kiel lingvo de la parolarto. En la fino Prof. Lapenna pledis por plua evoluigo de la internacilingva parolarto, akcentante, ke ĝi devas fariĝi ĉiam pli kaj pli vivanta parolarto per vivanta lingvo de vivanta internacia kolektivo.

La prelegon ĉeestis ĉirkaŭ 800 personoj kaj ricevis tre varman aplaŭdon.

☆

Mardon matene je la 9a prelegis Mag. William Auld pri *"La evoluo de la Esperanta poezio"* :

La ĉefa diferenco inter la prozo kaj la poezio estas lingva. Ĝenerale la sintakso de la poemoj estas pli simpla, la esprimrimedoj estas pli riĉaj, kaj la vortprovizo pli granda. Dua diferenco estas, ne la rimoj, sed la ritmo; tiel ke eĉ poemoj, kiuj ne havas t.n. "regulan" ritmon, tamen sentiĝas ritme.

En ĉiuj lingvoj, eĉ en la primitivaj, la vortprovizo de la poezio estas pli riĉa ol la proza literaturo, kiu siavice estas pli riĉa ol la ĉiutaga komuna lingvaĵo. Se oni komparas diversajn stadiojn en la evoluo de iu ajn lingvo, oni konstatas, ne nur ke ĝi konstante ŝanĝiĝadas, sed ke ĝi ankaŭ pliriĉiĝadis. En certa stadio de la lingvo — nome, en la stadio de literatura floriĝo (kio okazis por la angla lingvo dum la 16a jarcento, por iuj aliaj okcidenteŭropaj lingvoj iom pli frue, por la plimultaj orienteŭropaj lingvoj pli malfrue) — la lingvo estis tute subite riĉigita per enfluego de neologismoj.

Verŝajne la granda epoko de la neologismoj — almenaŭ de la poeziaj neologismoj — en Esperanto jam forpasis. En la neologisma disputo, kiu uraganis tra Esperantujo inter la du militoj, la granda ĉampiono de la poeziaj vortoj estis kompreneble D-ro Kalocsay, kaj nature kontraŭ lin direktiĝis la obusoj de la konservativuloj. Pro tio

D-ro Paul Neergaard, ĉefredaktoro de "Esperantologio", transdonas specialan numeron de tiu grava revuo, kun eseoj speciale verkitaj por la okazo, al Prof. Gaston Waringhien okaze de ties 60-jara datreveno. Prezidas la Rektoro de la Internacia Somera Universitato, Prof. Collinson.

multaj homoj ricevis la impreson, ke li efektive kreis ilin. Plejparte tio ne estas vera. Li listigis ilin; sed ili estis uzitaj multe pli frue. En 1887 la lingvo havis nur 904 vortojn; en 1894 ĝi havis 2,599; en 1954 la Fundamentaj kaj Oficialaj vortoj estis 4,425. Evidente tiu kreskado okazis per la enkonduko de novaj vortoj; kaj, ĝenerale parolante, tiuj vortoj estis urĝe bezonataj de la komuna lingvaĵo ĉiutaga, do oni ne plendis. Nur poste aŭdiĝis la unuaj plendoj, kiam Zamenhof kaj aliaj daŭre aldonadis vortojn al la stoko. Ilia bezono sentiĝis pro la grandaj laboroj sur la literatura kampo. Kelkaj esperantistoj povis akcepti tion, ĝuste ĉar ĝin faris Zamenhof. Ili tamen opiniis, ke post la morto de li tiaj novaĵoj devas ĉesi. Tiu koncepto ignoras la fakton, ke la dato de la morto de Zamenhof estis io tute hazarda kaj sen rilato al la preciza stadio ĉe kiu tiam troviĝis la lingvo. La literatura ekfloro de Esperanto nur komenciĝis. Tial la verkistoj post la Unua Mondmilito ne hezitis ankoraŭ pli riĉigi la lingvon per 300-400 vortoj pli aŭ malpli "novaj", tiel fine kreante, apud la jam delonge sufiĉa komuna lingvo, plene kapablan literaturan instrumenton.

Sed post la Dua Mondmilito aperis tute nova generacio de esperantistoj, kiuj akceptis la lingvon kaj la literaturon tia, kia ĝi tiam estis. Ili ne plu sentis mankojn ĉe la lingvo. Ili nenion sciis pri la granda neologisma batalo, kaj ili ankaŭ ne interesiĝis pri tio. Ili ricevis sian lingvon tute formitan, kaj respektis en ĝi tiun saman tradicion, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj. Iliaj vortoj estas "neologismoj" nur al tiuj, kiuj memoras tiun tempon, kiam ili fakte estis neologismoj.

Oni devas taksi la verkistojn, prenante en konsideron ankaŭ la lingvan fonon, antaŭ kiu ili laboris. La neologisma problemo estis natura feno-

meno okazinta en ĉiuj lingvoj; oni pli bone komprenas la atingojn de ekzemple Kalocsay, kiam oni komprenas, ke li devis ankaŭ certagrade krei la ilon, kiun li volis uzi, kiel siatempe devis fari pri la angla lingvo Edmund Spenser aŭ pri la franca lingvo Ronsard kaj la Plejado.

☆

Merkredon je la 9a, Lic. Tibor Sekelj prelegis pri la temo, *"Artoj en Afriko"* : —

En neniu alia mondparto, kiel en Afriko, la artoj estas rebrilo kaj kondensigo de la spirita vivo de la homo. La timoj kaj esperoj de la arbarloĝantaro materiiĝas en la strangaj nigraj lignoskulptaĵoj el Kongo. La fiereco de la batalemaj popoloj de la regno de Benin estas klare esprimita en la sennombraj mirindaj bronzskulptaĵoj el Nigerio. La dancoj kaj la muziko de la afrikaj popoloj ankoraŭ estas unusola nedividebla tuto.

Vendredon je la 9a, la vicprezidanto de UEA, Prof. D-ro Hideo Yagi, prelegis pri *"Esenco de la japana arto"* : —

Tra longa historio influis la japanon la hinda, ĉina kaj okcidenta kulturoj, sed la japano mem kreis sian propran arton, kies esenco troviĝas en "simpleco de belo". Oni pensas, ke la beleco de la arto ekzistas ne en formo, sed en ideo aŭ animo. "Zen", unu sekto de Budaismo, kontribuis krei tiun koncepton. Senlima beleco estas maksimume simpla en formo .... estas la esenco de la japana arto. Domo, ĝardeno, palaco, pentraĵo, odo, ceremonio, k.t.p. ĉiuj penas trovi sian belecon en simpla malluksa, nepompa kaj senornama eksterajo.

☆

Ĉar Prof. D-ro Stojan Djoudjeff ne povis alveni la Kongreson, ne okazis lia anoncita prelego, "La *lingvo de la muziko kaj la muziko de la lingvo*".

LA DUMKONGRESA LABORO DE U.E.A.

DECIDOJ DE LA KOMITATO

La Komitato de U.E.A. havis du kunsidojn, sabaton kaj merkredon, kiuj daŭris entute 12 horojn, kaj traktis 30 punktojn kun multaj subpunktoj. En la unua kunsido ĝi elektis tri komisionojn : por elekto de nova prezidanto, por ŝanĝoj en Statuto kaj Regularoj kaj por financoj. Ekster la Komitato tiuj komisionoj kunsidis entute 13 horojn kaj transdonis en la dua Komitatkunsido siajn multobligitajn raportojn.

La ĉefaj decidoj de la Komitato estas la jenaj :

Prezidanto. Pro la forpaso de Prof. Canuto starigis la demando pri elekto de nova Prezidanto. Konsiderante la fakton ke la Asocio depost la morto de la Prezidanto funkciis kontentige, kiel ankaŭ ke en la venonta jaro devos okazi la novaj elektoj por la Komitato kaj Estraro, la Komitato decidis, konforme al la propono de la koncerna komisiono, ke restu la sama situacio ĝis la Kongreso en Kopenhago : restu la sama Estraro, kaj S-ro H. W. Holmes daŭrigu kiel anstataŭa Prezidanto de la Asocio.

Honora Membreco. Konsiderante la grandajn meritojn de Prof. G. Waringhien, speciale por la Esperanta literaturo kaj pro lia konstanta laborado super la "Plena Vortaro", "Plena Gramatiko" k.a., la Komitato unuanime kun plezuro nomis lin Honora Membro de UEA okaze de lia 60-a datreveno.

Kongresa Regularo. Antaŭ la Komitato estis propono de la estrarano pri financoj, S-ro Woessink, pri ŝanĝoj en la Kongresa Regularo, kiun proponon la Estraro post kelkaj modifoj estis adoptinta kiel la sian. Post detala esplorado de ĉiuj unuopaj paragrafoj kaj farinte kelkajn ŝanĝojn kaj aldonojn, la koncerna komisiono en sia raporto rekomendis al la Komitato akcepti tiun proponon. Post serioza konsidero de la proponitaj ŝanĝoj la Komitato akceptis la novan Kongresan Regularon. Ĝia ĉefa trajto estas, ke ĝi estas pli elasta ol la malnova. La Kongresa Oficejo troviĝos en la Centra Oficejo kaj la Konstanta Kongresa Sekretario estos oficisto de la C.O., speciale ŝarĝita per la organizado de la kongresoj. Li troviĝos en la kongresa urbo tiom longe kiom estos necese laŭ la cirkonstancoj, ĉu tutan jaron aŭ nur kelkajn monatojn. Grava ŝanĝo estas farita koncerne la financojn. La nova regularo konsiderinde malpezigas la financan respondecon de L.K.K. kaj de la individuaj L.K.K.-anoj.

Agado en Azio kaj Afriko. La Komitato decidis disigi la agadon, ĉar la cirkonstancoj en la du mondpartoj estas tro diferencaj. U.E.A. eldonos broŝuron ankaŭ en afrikaj lingvoj, sendotan ĉu al Afriko rekte, ĉu en eŭropajn universitatojn, kie studas afrikaj studentoj. Oni okazigos konferencojn por afrikaj studentoj en la universitatoj. Koncerne Azion, okazos en Tokio unu jaron antaŭ la U.K. la Olimpiaj Ludoj. En kunligo kun ili difinita agado estos entreprenita. La Komitato invitis al sia kunsido ĉiujn kongresanojn el aziaj kaj afrikaj landoj, kiam ĉi tiu temo estis pritraktata.

Ekzamena Komisiono. La Komitato kompletigis la Internacian Ekzamenan Komisionon per alelekto de F-ino Marjorie Boulton kaj samtempe nomis ŝin sekretariino de tiu komisiono. Ĝis nun funkciis kiel sekretario S-ro Norman R. Smith, kiu pro ampleksaj aliaj taskoj devis rezigni pri tiu funkcio. La Komitato esprimis dankon al S-ro Smith pro la farita malfacila laboro por funkciigi la ekzamenojn.

Estrara Raporto. La Komitato detale diskutis la Estraran Raporton, kiun ricevis ĉiu kongresano en presita formo, kaj akceptis ĝin kun aparta danko al la Ĝenerala Sekretario, Prof. I. Lapenna, pro la grandega kaj multflanka laboro farita.

Financa Raporto. Laŭ propono de la financa komisiono, kiu detale trastudis la ampleksan kaj fake faritan financan raporton kaj ĉiujn dokumentojn apartenantajn al ĝi, la Komitato akceptis tiun raporton kaj malŝarĝis la Estraron pri la financoj de 1960.

Aliĝo Faka Asocio. La Komitato akceptis kiel aliĝintan fakan asocion en la senco de art. 14 de la Statuto la Internacian Asocion de Juristoj-Esperantistoj. I.A.J.E. nomis kiel komitatanon A S-ron Sven Ziegler el Kopenhago.

Aliĝo de Landa Asocio. La Komitato akceptis kiel aliĝintan landan Asocion la Esperanto-Ligon en Israelo.

Malkonfido al komitatano C. en la senco de art. 8 de la Statuto. Post ampleksa esplorado de detalaj raportoj pri ĉiuj faktoj, la komitatanoj A kaj B ne povis ne esprimi malkonfidon pri la komitatano C Hans Jakob, pro insista malobservado de decidoj de la Komitato. Sekve de tio, S-ro Jakob ne plu apartenas al la Komitato.

Kontrolantoj. La Komitato nomis kiel kontrolantojn de la kontoj en la C.O. sinjorojn Albers (Nederlando) kaj Maertens (Belgujo), de la konto en Londono sinjorojn Parker kaj Rapley (ambaŭ Britujo). Ĉar laŭ propono de S-ro Malmgren mem la Estraro jam decidis ke la Garantia Fondaĵo estos administrata en la Centra Oficejo, ne plu estis necese nomi kontrolantojn por la konto en Stokholmo.

DECIDOJ DE LA ESTRARO

La Estraro kunsidis sesfoje dum entute 20 horoj kaj finis ampleksan tagordon. Ĝiaj ĉefaj decidoj estas la jenaj :

Konstanta Kongresa Sekretario. Pro la maldungiĝo de S-ro G. C. Fighiera, kiu trovis firman postenon en Bruselo, kie li baldaŭ establiĝos, la Estraro nomis kiel novan K.K.S. S-ron Glaŭco Pompilio. La nova K.K.S. estas italo, kiu en 1955 estis kasisto de L.K.K.-Bologna kaj nun loĝas en Rotterdam, kie li jam kvar jarojn oficas en la Centra Oficejo.

Belarto. La Estraro principe decidis ke ĝi aperu kvarfoje jare kiel literatura revuo. Pliaj detaloj estos poste publikigitaj. La kajero 1961 aperos en la proksima aŭtuno.

Eldonaĵoj. En la serio Oriento-Okcidento post la jam aperinta valora verko Malsata Ŝtono tri pliaj libroj estas en preparo. Plue, aperos poŝkalendaro kun proverbaro, dum U.E.A. donos aŭspiciojn al eldonata fotolibro.

Informaj eldonaĵoj. Jam aperis nova eldono de la konata seslingva flugfolio de U.E.A., nun i.a. kun la lingvoj japana kaj rusa. Krome, ĵus aperis seslingva informfolio por universitatanoj kun subskriboj de granda nombro da universitataj profesoroj. Pri eldono de unu el la afiŝoj de la tiurilata konkurso la Estraro decidos post interkonsiliĝo kun la presejo.

Azio-Afriko. La Estraro decidis subvencii vojaĝon de S-ro Victor Sadler al Cejlono por fari tie sesmonatajn kursojn. Ĝi decidis ankaŭ plue subvencii la vojaĝojn de S-ino Haudebine, kiu ankoraŭ troviĝas en New Delhi, kaj de S-ro Milojeviĉ, kiu laboras nun en Nepalo.

Ĝeneva oficejo. La sidejo de la Serva Centro de U.E.A., kiu laŭstatute troviĝas en Svislando, estos transigita al Zürich kaj kiel ĝian Administranton la Estraro nomis S-ron J. Sturzenegger.

U.K. Kopenhago 1962. La Estraro aprobis la provizoran buĝeton, kiun prezentis L.K.K. La Kopenhaga L.K.K. faris la inviton laŭ la malnova regularo, sed, ĉar la nova regularo estas pli favora, verŝajne ĝi decidos nun labori laŭ la nova.

U.K. 1963 kaj 1964. Ĉar neniu invito estis ankoraŭ tute matura kaj ĉar la invitantoj devos eventuale ripeti sian inviton surbaze de la nova regularo, la Estraro faris ankoraŭ neniun decidon pri la Universalaj Kongresoj en tiuj jaroj.

U.K. 1965. Kiel konate, la decido pri la U.K. en Tokio en tiu jaro jam estis pli frue farita. La Estraro ripetis sian alvokon al la esperantistoj, per frua ŝparado ebligi al si partoprenon en tiu kongreso. Fikso de la kotizo en la nuna momento ankoraŭ ne estas ebla. Sekve, definitivaj aliĝoj ankoraŭ ne povas esti akceptitaj, sed la C.O. daŭre akceptos principajn anoncojn pri partopreno en tiu kongreso kaj en aviadila karavano tien.

Nova domo de U.E.A. Pro minacanta malkonstruo de la domo en kiu nuntempe troviĝas la Centra Oficejo, la Estraro decidis aĉeti en la centro de Rotterdam propran domon, kiun pro hazardaj cirkonstancoj ĝi povis havigi je favoraj kondiĉoj. En tiu domo estos investita la tiucele konservita kapitalo en Londono, deveninta de la antaŭa domo en Heronsgate, kiel ankaŭ la obligacioj en kanadaj dolaroj troviĝantaj en la Garantia Fondaĵo. Por la cetera sumo necesos preni hipotekon. La Estraro forte apelacias al landaj asocioj, grupoj kaj individuaj esperantistoj kontribui per donacoj por instali kaj beligi ĉi tiun novan propran sidejon de la Asocio.

Instanco aŭ persono kiu kontribuos per minimume 5000 gld. (20.000 steloj) ricevos ĉambron en la domo laŭ sia nomo.

La Estraro decidis aĉeti por la domo kopion de la portreto de Prof. Canuto faritan de la itala pentristo Lo Martire, laŭ la originalo ekspoziciita en la Kongresejo.

LA ĜENERALAJ KUNVENOJ DE U.E.A.

Ambaŭ kunvenoj okazis en la prelegejo de hotelo Majestic, kiu ambaŭfoje estis plena. La unua kunsidon, lundon, prezidis Prof. Yagi, dum raportanto estis la estrarano por landaj kaj fakaj asocioj, S-ro Rajski. La temo estis : "La lastjaraj atingoj de la Esperanto-Movado laŭ landoj kaj fakoj". La tagordo estis bone preparita. Estis skribe anoncintaj sin 17 reprezentantoj de landaj kaj fakaj asocioj por raporti pri la temo. Ili laŭvice koncize informis pri la lastjaraj atingoj en sia medio, per kio la ĉeestantoj ricevis bonan superrigardon pri la hodiaŭa stato de la movado. Kelkfoje oni aŭdis interesajn, gravajn kaj ĝis nun nekonatajn rezultojn. Montriĝis tre necese, ke la landaj kaj fakaj asocioj regule raportu pri siaj atingaĵoj al la redaktoro de la Internacia Gazetara Servo, nun S-ro G. Pompilio, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando. Detalojn pri la raportitaj faktoj oni legos en la Aldono al la Estrara Raporto, aperonta en la Dua Parto de la Jarlibro.

La dua ĝenerala kunveno okazis vendredon sub prezido de S-ro Holmes. Oni traktis la Estraran Raporton, kiun ricevis ĉiu kongresano en presita formo. D-ro Lapenna enkondukis ĝin kaj respondis al demandoj pri unuopaj ĉapitroj. Post iom da diskuto la kongresanoj akceptis la Estraran Raporton per forta aplaŭdo, tiel montrante sian kontentecon pri la ampleksega laboro farita. La prezidanto interpretis ĉies pensojn, esprimante grandan dankon al la ĝenerala sekretario, kiu kompilis la raporton kaj al kies senlaca kaj persista laboro en la limigitâ libera tempo, kiun lasas al li la universitata okupo, ŝuldiĝas la grandega plimulto de ĉiuj rezultoj atingitaj de la Asocio.

La estrarano pri financoj, S-ro Woessink, apelaciis al la kongresanoj varbi apogantojn por la Asocio, nome personojn-neesperantistojn, sed simpatiantajn kun la movado, kiuj unufoje en la vivo pagas la sumon de 5 gld (20 steloj) kaj ricevas atestilon. Li instigis ĉiujn ĉeestantojn havigi al si libreton de tiaj atestiloj. Provizo troviĝis sur la estrara tablo. Pluraj bonvoluloj agis laŭ tiu rekomendo. Daŭre tiaj libretoj por Apogantoj estas riceveblaj de la Centra Oficejo.

La dua punkto de la tagordo estis la raportoj de fakaj kaj neneŭtralaj asocioj pri la laboro farita dum tiu ĉi Kongreso. Oni aŭdis raportojn de plej diversaj organizaĵoj, el kiuj montriĝis ke grandega laboro estis farita dum la Kongreso ankaŭ en malgrandaj rondoj sur specialigitaj kampoj. Detalojn pri la raportitaj laboroj oni trovos en la venonta numero de "Esperanto".

INFORMAJ FAKOJ

La Informa Fako de U.E.A. kunvokis kunvenon de reprezentantoj de la landaj Informaj Fakoj sub prezido de sia gvidanto D ro Ivo Lapenna je merkredo. Partoprenis 16 reprezentantoj. La tagordo konsistis el analizo de la rezultoj atingitaj en 1961, organizo de modelaj landaj Informaj Fakoj, organizo de informado pri U.K. kaj aliaj aranĝoj, afiŝo, aliaj demandoj.

La kunveno notis la rezultojn en pluraj landoj laŭ la publikigo en la jul/aŭg. numero de la revuo Esperanto kontentigaj kaj aparte rimarkis ke la sukceso de la informado multe dependas de la fakta funkciado de landa informa fako aŭ prizorganto. Tial ĝi varme rekomendas al la Landaj Asocioj kaj Informaj Fakoj stabiligi kaj aktivigi la jam ekzistantajn. Oni speciale atentigis pri la neceso observi la principojn de Frostavallen. Oni skizis la skemon de modela Informa Fako landa.

La kunveno rekomendas al la Landaj Asocioj krei Informajn Fakojn kaj plilarĝigi la reton de kunlaborantoj. Modela informa fako devas labori laŭ la principoj de Frostavallen kaj uzi modernajn varbmetodojn (radio, gazetaro, foto- kaj sonbendoj, flugfolioj ktp.). La kunveno opiniis, ke la ideo pri eldono de afiŝo estas tre bona. Pritraktante la gravecon de la demando pri vigligo de la lokaj grupoj, la kunveno sugestis aranĝi modelan kunvenon de loka grupo dum la Kopenhaga Kongreso.

La kunveno opiniis, ke estos celkonforme eluzi la 75-jaran datrevenon de la apero de Esperanto por informaj celoj. Tamen, speciala kampanjo ŝajne ne estos bezonata. La kunveno aparte atentigis ankaŭ pri la signifo de seriozaj informoj aperontaj en la grandaj naciaj gazetoj kaj rekomendas al la landaj asocioj utiligi pli vaste la bultenojn de la Internacia Gazetara Servo.

LERNEJA KAMPANJO

La komisiitoj por la Lerneja Kampanjo kunvenis lundon sub prezido de D-ro Ivo Lapenna, la gvidanto de la kampanjo. Partoprenis 24 personoj el 11 landoj. La tagordo enhavis jenajn erojn : Raporto pri la nuna stato; Iniciato en Pollando; Internacia Konferenco de lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata; Raporto al UNESKO.

Oni konstatis ke por internacia konvencio du landoj estas pretaj : Pollando kaj Jugoslavio. Trovendaj estas tri aliaj. Taŭgaj eblecoj ekzistas en Brazilo, Novzelando, Svedlando, Danlando, Finnlando, Islando. Reprezentanto de la pola registaro vizitos la respondecajn aŭtoritatulojn en popoldemokratioj. Li vizitu tiujn aŭtoritatulojn ankaŭ en la menciitaj aliaj landoj kune kun kompetentulo el la lando mem kaj eventuale kun la ĝenerala sekretario de UEA.

Internacia renkontiĝo de infanoj sub la titolo "Infanoj ne konas limojn" kaj paralela konferenco de instruistoj estos preparataj en Jugoslavio, ambaŭ kun partoprenantoj nur el lernejoj, en kiuj Esperanto nun estas instruata. Ili estos aranĝitaj sub aŭspicioj de la jugoslavia UNESKO-komisiono. Pri la aranĝoj raporto al UNESKO estos farita pere de la landaj komisiitoj kaj de la naciaj UNESKO-komisionoj.

LA KOMISIONO "ORIENTO-OKCIDENTO"

La internacia komisiono de U.E.A., starigita en Mainz, por la interŝanĝo de orientaj kaj okcidentaj kulturaj valoroj, paralela al la tiukoncerna Granda Projekto de UNESKO, kunvenis lundon. Prezidis S-ro Norman Smith, estrarano pri kulturaj aferoj kaj sekretario de la komisiono. Li raportis pri la Seminario "Oriento-Okcidento", ĵus okazinta en Londono kaj informis pri diversaj planoj. Por povi ĉion plenumi, urĝe bezonataj estas seriozaj, kompetentaj kaj lertaj kunlaborantoj.

En la eldonplano ĵus aperis la unua volumo, Malsata Ŝtono, de Rabindranath Tagore, ĉe Eldona Societo Esperanto en Malmö. Franca, japana kaj argentina verkoj estas en preparo.

Planoj pri pliaj seminarioj, ankaŭ en oriento, kaj pri prelegvojaĝoj estis diskutataj. Ĉeestis la kunsidon ankaŭ pluraj nekomisionanoj, i.a. kelkaj okcidentanoj, kiuj pli aŭ malpli longe loĝis aŭ vojaĝis en oriento kaj kiuj povis taŭge kontribui al la diskutoj. La diversaj sugestoj estos konsideritaj kaj ellaborataj de la komisiono.

EŬROPA LINGVO-KAMPANJO

Sub prezido de la estrarano por tiu ĉi kampanjo, D-ro W. Herrmann, okazis kunsido lundon. Ĝia temo estis "La nuna situacio de la kampanjo". La prezidanto informis pri la faritaj agadoj en la lasta jaro, precipe por atingi ke la Kulturkomisiono de la Eŭropa Konsilantaro traktu la demandon de Esperanto. Pere de la koncernaj ministerioj ampleksa Memorando estis direktita al la Konferenco de eŭropaj edukministroj en Hamburgo okazinta en la nuna jaro. Rezulto ankoraŭ ne estis atingita, sed pliaj paŝoj estos faritaj okaze de nun preparata nova konferenco de tiuj ministroj. Daŭra taŭga informado pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj eblecoj al la edukministroj pere de landaj komisiitoj aŭ de landaj asocioj estas nepre necesa.

ALIAJ ARANĜOJ KAJ GRAVAĴOJ

AKADEMIO

La Akademio de Esperanto okazigis nepublikan kunsidon sub gvidado de la Prezidanto, Inĝ. J. R. G. Isbrucker, por diskuti internajn aferojn. Partoprenis 9 akademianoj.

Krome, la Akademio okazigis publikan kunvenon, kiun povis ĉeesti ĉiu kongresano. Ĉeestis ĉ. 250 personoj. La temo estis : "La senpera verbigo de adjektivoj kaj la principo de neceso". Prezidis Inĝ. Isbrucker. La publiko larĝe utiligis la eblecon partopreni en la diskuto, kiu estis tre vigla. Oni konstatis ke la opinioj diferencas kaj ke oni devos observi la plian evoluon de la lingvo tiurilate.

OFICIALAJ AKCEPTOJ

La Urbestro de Harrogate, Konsilanto Frank Allum, alparolis la kongresanaron en la teatro sabaton dum la Interkona Vespero, deziris al ili agrablan restadon en lia urbo kaj fruktodonan laboron. Poste sekvis regalo aranĝita en la teatraj koridoroj, dum en la senseĝigita teatra salono la kongresanoj interkonatiĝe dancis kaj amuziĝis.

En aparta teatra ĉambro la Urbestro kaj Sinjorino Allum poste akceptis la kongresan Prezidantaron, la Estraron kaj kelkajn aliajn funkciulojn kaj restis longe konversaciantaj kun ili, demandante multajn detalojn pri la lingvo kaj movado.

Ĵaŭdon la Urbestro de la jorkŝira urbo Keighley, Alderman J. N. Welch, akceptis la Estraron kaj aliajn reprezentantojn pro la fakto, ke en lia urbo siatempe naskiĝis la brita Esperanto-movado. En sia respondo al la afabla parolado de la Urbestro, la Prezidanto de la Kongreso, Prof. H. Yagi, povis mencii, ke ĝuste en lia urbo, Okayama, naskiĝis la japana Esperanto-movado. La paroladon de la Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, S-ro Norman R. Smith, la Urbestro aŭskultis kun granda intereso kaj poste li petis ankoraŭ plurajn klarigojn.

BRITA MATINEO

Ĉi tiu aranĝo okazis en la Reĝa Banejo. Partoprenis proksimume 80 personoj. S-ro W. Auld parolis pri la Skotoj, Kimroj kaj Nord-Irlandanoj, kun statistikaj informoj kiuj montris la gravecon de la neanglaj Britoj, kaj klarigis diversajn interesajn diferencojn, ekz. pri eduksistemo skota, pri migrado de Skotoj al aliaj landoj, skotaj monbiletoj, lingvoj k.s. F-ino M. Boulton parolis pri la brita kleriga sistemo. Post la prezentoj ŝi respondis al demandoj pri aliaj lingvoj britaj kaj pri aliaj demandoj.

Ĉe la Oficiala Akcepto la Urbestro de Harrogate interparolas kun Prof. Collinson, Anglujo, kaj Prof. D-ro Yagi, Japanujo.

LA BANKEDO

La Bankedo okazis mardon en granda salono de hotelo CROWN. Partoprenis preskaŭ 300 kongresanoj. La agordo estis tre agrabla kaj gaja kaj la menuo tre bona. Tabloprezidanto estis S-ro H. W. Holmes, kiu je la deserto tostis al la Prezidanto de la Kongreso, Prof. Hideo Yagi el Japanujo, kiu tuj transigis la toston al la tuta kongresanaro kaj deziris ĉies sanon kaj feliĉon.

LA KONGRESA BALO

Por la Balo la Teatro estis same aranĝita kiel por la Interkona Vespero. Ĝi montriĝis sufiĉe bona maniero, kvankam la publiko ne povis ĉe tabloj sidi ĉirkaŭ la dancplanko. Ludis bonega orkestro sub direktado de S-ro Walter Garrard. Bela surprizo estis prezentado de skotaj folkloraj dancistoj en la konataj karakterizaj kostumoj, akompanata de tamburisto kaj sakflutludisto en imponaj ceremoniaj uniformoj. La Balo daŭris ĝis la 2-a matene.

DISERVOJ

Katolika Diservo okazis en la preĝejo S-ta Roberto. Ĉeestis ĉirkaŭ 300 personoj. Sac. Prof. Ludwig Thalmaier el Bavarujo (Germanujo) celebris la meson kaj predikis esperantlingve pri la signifo de la Biblio, menciante la novan eldonon en Esperanto. Oni kantis komune laŭ la teksto de la libreto "Ni oferas", verkita de Sac. Thalmaier.

Protestanta Diservo okazis en la preĝejo S-ta Petro aranĝita de K.E.L.I. sub gvido kaj prediko de Prof. Pastoro W. J. Downes. Partoprenis ĉirkaŭ 280 personoj.

JUNULARA VESPERO

Ĝi okazis merkredon por gejunuloj ĝis 25 jaroj kaj la gvidantoj de T.E.J.O. en la Reĝa Banejo. Partoprenis 150 gejunuloj el 15 landoj. Okazis dancado, gajaj konkursaj ludoj kun la muziko de Walter Garrard's Orchestro kaj ĵazgrupo el Ljubljana (Jugoslavio).

EKSKURSOJ

Kiel kutime, la kongresa ĵaŭdo estis dediĉita al tuttagaj ekskursoj. Ĉi jare oni povis elekti el tri diversaj. La plej multajn partoprenantojn altiris la vizito al la mirinda nordangla lagregiono, certe pro la internacia famo de tiu belega regiono. Ses aŭtobusoj veturigis la kongresanojn tien. Favoris la ekskurson bona vetero kaj ĉiuj revenis lacaj, sed kontentaj.

Ankaŭ al Scarborough, ĉe la norda maro, tre multaj kongresanoj veturis, por resti sur la strando, ŝipveturi aŭ viziti la kastelon. Tie la suno estis malpli bonvola, sed tamen la ekskurso estis tre sukcesa.

Malpli da personoj vizitis la valojn kaj montojn de Norda Jorkŝiro, kien oni veturis en du aŭtobusoj. Pitoreskaj vilaĝoj alternis kun ĉarmaj valoj, imponaj kasteloj kaj belaj panoramoj. Tre belan impreson oni ricevis ankaŭ de tiu regiono.

Krome okazis pluraj malpli grandaj sed tre belaj ekskursoj, i.a. al Knaresborough, al la Palaco Harewood, al la Monaĥejo Fountains kaj al York. La ekskursa servo streĉis sin por ke ĉio glate funkciu kaj ĉiuj estis tre kontentaj.

LA KONGRESA GAZETARA SERVO

Kun granda plezuro ni povas mencii, ke la Kongresa Gazetara Servo sub sperta gvidado de S-ro Marinko Ĝivoje, Jugoslavio, funkciis ĉijare gratulinde akurate, tiel ke jam je la kongresfina sabato posttagmeze la lasta bulteno estis aperinta kaj la bultenaro ampleksanta 53 paĝojn estis dissendita tra la mondo. La gvidantoj de apartaj branĉoj estis S-roj D. Bloxham kaj G. E. Money, ambaŭ Britujo, dum helpis tuta aro da aliaj personoj. Koran gratulon pro la bonega rezulto meritas ĉiuj. Dum la kongresa semajno granda nombro da artikoloj kaj raportoj aperis en la regiona gazetaro de Jorkŝiro.

La informado pri la Kongreso ne limiĝis al la gazetaro, sed okazis ankaŭ du televidaj elsendoj. La unua, jam je la antaŭkongresa vendredo, estis intervjuo kun la ĝenerala sekretario kaj estrarano pri kongresoj Prof. Ivo Lapenna en unu el la plej multrigardataj programoj de B.B.C., "To night". Estas certe, ke milionoj da britoj ĝin vidis. La alia okazis merkredon, kiam estis elsendita la komenca parto de la Oratora Konkurso.

Kiel kutime, la K.G.S. laboris dum la tuta jaro kaj regule eldonis bultenojn pri gravaj aspektoj de la Kongreso. Kelkajn monatojn antaŭ la Kongreso okazis du grandaj gazetaraj konferencoj, en Manĉestro kaj Londono, dum alia okazis en Harrogate je la antaŭkongresa vendredo.

LA KONGRESA LIBRO

La Kongresa Libro, 104-paĝa, aspektis iom pli modesta ol la antaŭaj, sed en sia simpleco ĝi bone respondis al la celo. Grandega avantaĝo estis, ke oni revenis al la iama kutimo dissendi la libron jam unu monaton antaŭ la Kongreso. Krom la kutimaj rubrikoj la libro enhavas interesan artikolon de G. C. Fighiera pri la evoluo de la universalaj kongresoj, kun statistika superrigardo.

LA KONGRESEJO

La Kongresejo ne estis giganta kiel la varsovia, nek luksa kiel la brusela, sed ĝi estis praktika kaj kontentiga. En la granda ekspozicia halo facile trovis lokon ĉiuj giĉetoj de la akceptejo kaj granda aro da budoj. Krom bufedon kaj larĝan spacon por sidi, skribi, manĝi kaj babili, la kongresanoj trovis tie ankaŭ kvin malgrandajn ekspoziciojn (pri pentraĵoj, fotoj, afiŝoj, japanaĵoj kaj C.E.D.).

La 116 kongresaj programeroj grandparte okazis en 5-6 diversaj konstruaĵoj, sed tiel proksimaj unuj al la aliaj, ke apenaŭ tio estis ĝena.

LA SOLENA FERMO DE LA 46-a U.K.

Je la 9a matene, sabaton la 12an de aŭgusto, komenciĝis la Solena Fermo de la Kongreso, sub prezido de s-ro H. W. Holmes, O.B.E., Vicprezidanto de UEA, kiu post kelkaj enkondukaj vortoj transdonis la parolon al la Ĝenerala Sekretario. D-ro Lapenna koncize raportis pri la laboroj kaj decidoj de la Komitato kaj Estraro. Tiujn decidojn oni povas legi en pli frua parto de tiu ĉi raportaro. En la fino de sia mallonga raporto li legis la Kongresan Rezolucion, kiun la kongresanaro akceptis kun aplaŭdo. Jen la teksto de la

KONGRESA REZOLUCIO

La 46-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 5-a ĝis la 12-a de Aŭgusto 1961 en Harrogate, en la ĉeesto de 1700 reprezentantoj el 35 landoj :

Konstatas kun aprobo, ke la Unua Internacia Arta Festivalo pliriĉigis la internacilingvan kulturon kaj, kune kun la Seminario "Oriento-Okcidento" en Londono, donis novan apogon al la celoj de UNESKO;

Notas, ke, rezulte de la Rezolucio de la Varsovia Kongreso kaj la decido de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio de la 15-a de Decembro, 1959, paralele kun la daŭra grandiĝo de la kulturaj valoroj kreataj en Esperanto, jam konsiderinde vastiĝis la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj;

Kaj sekve, esprimas la opinion, ke maturiĝis la kondiĉoj por subskribo de Interŝtata Konvencio pri la laŭgrada paralela enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj porinstruistajn kolegiojn de pluraj ŝtatoj.

Tial la Kongreso rekomendas al la gvidaj instancoj de Universala Esperanto-Asocio daŭrigi kaj intensigi la agadon por realigo de tiu celo.

La posta punkto sur la tagordo estis la disdonado de la premioj. Mag. W. Auld transdonis la premiojn de la Belarta kaj la Deklama Konkursoj; Prof. G. Waringhien proklamis la rezultojn de la Oratora Konkurso kaj Prof. Lapenna transdonis la Arĝentan Pokalon apartenantan al tiu Konkurso. S-ro Norman Smith, Estrarano pri kulturaj aferoj, transdonis la unuan diplomon akiritan per sukcesa provo en la Internacia Ekzameno de UEA. Li diris, ke d-ro Albault estas la unua, kiu ĝin ricevis. La Diplomo estas la sola internacia atestilo pri supera instrukapablo en Esperanto; hodiaŭ ni estas sur la sojlo de novaj sukcesoj en la kampanjo enkondukigi Esperanton en la lernejojn : evidente baldaŭ venos la tempo, kiam la aŭtoritatoj demandos al ni, kiuj estas la fidindaj personoj por la gvidado de lernado de Esperanto en la universitatoj kaj altlernejoj. Tiam ni povos respondi : jen estas diplomo akirita sub rigoraj kondiĉoj. Ĝi devus esti fiero de ĉiuj Landaj Asocioj kaj esperantistoj havi en ties vicoj almenaŭ unu esperantiston, kiu kapablas ĝin akiri. S-ro Guillaume transprenis la diplomon en la nomo de d-ro Albault.

La Prezidanto de la Kunsido dankis individue al ĉiuj, kies laborado kontribuis al la sukceso de la 46a. Li finis per apelacio al estontaj kongresanoj, ke ili ĉiam memoru, ke la deĵorantoj en la kongreso estas ĝuste niaj samideanoj, libervolaj laborantoj, kaj ne profesiaj dungitoj.

La Diplomo kaj la Arĝenta Sprono de KOKO estis transdonitaj al W. Auld je la nomo de John Francis. D-ro Lapenna anoncis, ke la Esperanto-Studgrupo en Londono, kies prezidanto li estas, decidis doni ĉiujare 25 pundojn por la *verko* de la jaro, t.e., por la verko, kiu laŭ la opinio de la Studgrupo plej grave kontribuis al la Esperanta kulturo. La premio estos donita por la unua fojo en Kopenhago, tiufoje por la plej bona verko de la pasintaj *tri* jaroj.

F-ino Duerden transdonis al la Prezidanto de LKK, s-ro Hamilton, donacon de la LKK, kun danko pro lia ĉiama pacienco, kiu ebligis harmonian kunlaboradon en LKK.

S-ro Hamilton dankis pro la donaco, kaj ankaŭ pro la modela kunlaborado de la LKK kaj ankaŭ de la KKS kaj lia edzino.

D-ro Neergaard invitis la kongresanojn al la 47a U.K. en Kopenhago la venontan aŭguston, kaj transprenis la Kongresan Flagon.

Fine Prof. D-ro Yagi diris siajn adiaŭajn vortojn : "Fartu bone, laboru sane. Mi deziras feliĉon al vi ĉiuj".

Post solena kantado de "La Espero" la Kongreso oficiale fermiĝis.



La plej juna esperantisto en la 46a U.K. estis la korŝtela belulino Lisa Helmuth el Usono. Konsterniĝis deĵorantoj en la Akceptejo, kiam ŝi aliris demandante, "Kiom kostas la kotizo por dujara knabino?" Lisa perfekte parolas Esperanton.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la aprilan numeron.

Radio. Roma. 1-IX, La fama napola kanzonverkisto E. A. Mario; 5-IX, Tra la literaturo; 8-IX, Giuseppe Aĵroldi, inventinto de la krucvortenigmoj; 12-IX, "La nomo de Maria", religia himno de A. Manzoni; 15-IX, Leterkesto kaj bibliografio; 19-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-IX, Novaĵoj el Italujo; 26-IX, Tra Romo : Vojo Appia; 29-IX, Alberobello kaj ĝiaj "trulli". Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj : S-ro Luigi Minnaja kaj D-ro Vincenzo Musella.

Radio Sofia nun elsendas per ondoj 41.18 m. kaj 39.11 m. de 19.00 ĝis 19.25 kaj per ondoj 41.35 kaj 30.93 m. de 22.30 ĝis 22.55. Saman tagon : dimanĉon.

Radio Zagreb daŭre elsendas sian kutiman interesan programon ĉiun ĵaŭdon. Aŭskultantoj ne forgesu sendi raportojn kaj sugestojn al la sindonema grupo de jugoslavaj redaktoroj kaj parolantoj de la stacio.

Radio Valencia jam de naŭ jaroj prezentas ĉiusemajnan programon en Esperanto. La celo estas diskonigi nian lingvon; pro tio, la programo entenas sciigojn parte hispanlingvajn kaj kurson. Nura uzo de mezaj ondoj kaj malforteco de la stacio bedaŭrinde ne ebligas longdistancan aŭskultadon, sed la penoj de niaj hispanaj samideanoj ne estas pro tio malpli laŭdindaj.

Pola Radio nun elsendas en Esperanto per alia stacio : Gdansk. La programo enhavas informojn pri la loka movado, informojn pri Esperanto en pola lingvo, humoraĵojn, poeziojn, kantojn. La sama programo estas ankaŭ disaŭdigata per la stacio Szczecin (sama ondlongo). Aŭskultu ĉi-tiun programon ĉiun ĵaŭdon de 6.00 ĝis 6.15 per ondoj 230 m. (1303 kcs). Bonvolu atenti pri ŝanĝoj de ondlongoj uzataj de la stacio Warszawa, anoncitaj en la junia numero de la revuo.

Svisa Radio : Vidu la majan numeron.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO la 1-an de aŭgusto 1961

N-ro 340

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de julio kaj ankaŭ por komparo je la fino de julio 1960.

	1960		*1961*	
Asociaj membroj	11.082		13,616	
Individuaj membroj				
MJ	780		783	
MA	4.827		5.115	
MS	552		470	
Pat.	5		2	
DM	349		413	
HM	43		43	
J-MJ	27		28	
J.MA	182		163	
		6.765		7.017
		17.847		20.633

Noto de la redakcio — En la venonta numero de "Esperanto" ni raportos pri la kunvenoj de specialigitaj asocioj, pri la Antaŭ- kaj Postkongresoj, Infankongreseto kaj pri aliaj aranĝoj okazintaj en ligo kun la Kongreso.

ATENTIGO — Tiuj personoj, kiu mendis fotojn, sed ne prenis ilin antaŭ forveturo, bonvolu sendi la kvitancon rekte al la fotisto, je la adreso trovigânta sur la kvitanco. Post tio oni tuj sendos al ili la fotojn.

DELEGITOJ

Argentino

Necochea D : vakas.

Brazilo

Canela (Rio Grande do Sul) D : S-ro A. Plauda da Silva, publika oficisto, Rua Júlio de Castilhos 328.

Jaú (São Paulo) FD (Radiologio) : S-ro Italo Peccioli, kuracisto, Rua Marechal Bittencourt 500.

Porto Alegre (Rio Grande do Sul) FD (Juro) : D-ro M. Belmonte de Abreu, juĝisto, Rua Jeronimo Coelho 30, ap. 51.

Rio de Janeiro (Guanabara) FD (Radio) : S-ino C. dos Santos Kozlovski, oficistino, Rua Eleone de Almeida 10, ap. 201, Catumbi.

São Lourenco (Minas Gerais) D : Kap. José Muniz da Silva, oficiro, Rua D-ro Antonio Carlos 59.

Britujo

Billericay D : vakas.

Bristol (Somerset) D : F-ino D. M. Fulford, ŝtatoficistino, 55 Waverley Road, Redland, Bristol 6.
FD (Fervojoj) : vakas.

Chester (Cheshire) D : S-ro Denis Williams, elektroteknikisto, 25, Sefton Road.

Crawley (Sussex) D : S-ro Raif Markarian, instruisto, "Las Marismas", 62 Rother Crescent, Gossops Green.

Freshwater D : vakas.

Royston D : vakas.

Danlando

København FD (Veldado) : S-ro Ib Schleicher, inĝeniero, Svejsecentralen, Nygaardsvej 47, København Ø.

Filipinoj

Manila (Luzon) D : S-ino M. P. Zamora Mascuñana, 1312 Colorado.

Finnlando

Kotka (Kymen lääni) D : S-ro Aarne A. Rintola, instruisto, Ruununmaankatu 20.
FD (Instruado) : La D.

Francujo

Aulnay-sous-Bois (Seine-et-Oise) FD (Religio Protestanta) : S-ro André Bachelier, ŝtatoficisto, 1 Bd. Félix-Faure.

Didenheim (Haut-Rhin) D : S-ro Fernand Buecher, kontisto, 1 rue Belle Vue.

Epinal (Vosges) D : F-ino Anna Jacquot, stenotajpistino, Vallon de Saint-Antoine, Chantraine-Epinal.

Paris FD (Lingvistiko) : S-ro Paul Ciliga, lingvisto, 56 rue d'Assas, Paris VI.
FD (Studentaj aferoj) : vakas.

St. Maurice-d'Etelan (Seine-Maritime) FD (Religio Katolika) : S-ro Daniel Bécue, paroĥestro, par Notre-Dame de Gravenchon.

Sarralbe (Moselle) D : S-ro P. L. Charles Biebel, poŝtoficejestro, Poŝtoficejo.
Vellexon D : vakas
FD (Religio Katolika) : vakas

Germanujo

Darmstadt (16) (Hessen) D : S-ro Heinrich Mattheß, rektoro, Richard-Wagner-Weg 57.
Kiel FD (Ekonomia kaj Politika Sciencoj) : vakas
München (13b) (Bayern) JD : F-ino Hannelore Lukesch, studentino, Pettenkoferstr. 32.

Hispanujo

Barcelona FD (Asekuro) : S-ro Rafael Gisbert, asekuristo, Conde de Garay, 28.

Jugoslavio

Novi Travnik (Bosna i Hercegovina) D : S-ro Petar Stefanović, profesoro, Kalinska 45/3.
FD (Filologia Latinida) : La D.
Osijek (Hrvatska) FD (Instruado) : S-ro Vojislav Borovac, instruisto, Gundulićeva 65.

Maroko

Casablanca D : vakas
Oujda D : vakas
Sebaa Aioun D : vakas
FD (Agrikulturo) : vakas

Monako

Monte-Carlo VD : S-ro P.H. M. Faivre-Duboz, Immeuble Scala.

Nederlando

Delft FD (Artoj Plastikaj) : vakas
Den Haag FD (Artoj Plastikaj) : S-ro Jan Schaap Jr., artinstruisto, Obrechtstraat 169 III.

Norvegujo

Arendal D : vakas

Pollando

Słupsk FD (Medicino) : vakas

Sovet-Unio

Kujbyŝev (Rossijskaja FSSR) D : S-ro I. M. Nartov, pensiulo, ul. Pskovskaja 19, kv. 15, obl., 52.
Moskva FD (Virinaj Aferoj) : F-ino Vera P. Zlotnikova, studentino, Bol. Ekaterininskaja ul. 18/20, kv. 25; I-110.
Tbilisi (Gruzinskaja SSR) D : S-ro G. Tkeŝelaŝvili, inĝeniero, ul. Pavlova 4-A.
FD (Elektrotekniko) : La D.

Sud-Afriko

Alberton (Transvaal) D : S-ro Henri W. Appel, konstruada direktisto, 8 St. Michaelroad, New-Redruth.
FD (Konstruado) : La D.

Svedujo

Grängesberg D : vakas
Nybro FD (Librotenado) : S-ino Linnea Edsenius, ĉeflibrotenistino, Vilhelmsgatan 2.
Valskog D : vakas

Svislando

Elgg D : vakas
FD (Blindul-aferoj) : vakas
Genève FD (Naturismo-Nudismo) : S-ro Paul Bouvier, oficisto, Route de Malagnou 52.

Usono

Escondido FD (Filologio) : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Ginz, S-ro Ota, Kirjat Jam Bet, Israelo
Hrynkiewicz, S-ro A., Santos Lugares, Argentino
Lemaire, S-ro René, Lyon, Francujo
Müller, S-ro Otto, Ravensburg, Germanujo

PATRONO 1961

2. Olsson, F-ino Agda, Göteborg, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

292. Oeste, S-ro W. Th., Köln, Germanujo; 293. Reinelt, Prof. D-ro J., Bonn, Germanujo; 447. Morgan S-ro H. W. Balgowlah, Aŭstralio; 448. Dias, D-ro E., Volta Rodonda, Brazilo.

FONDAĴO PROF. CANUTO

Antaŭa stato: 221 MA, 29 MJ, 4 J-MJ kaj 1 J-MA.

Dopolavoro Ferroviario Esp. Sampierdarena, Esp.-Grupo Parma, Prof. Pacelli, D-rino E. Volpari, S-ro Malaroda, S-ro Crosatto, S-ro Kurt Greutert, S-ro A. Osto, Grupo Trieste, B. G., S-ro R. de Rossi, S-ro P. Gallo Lassere, Prof. A. Lacalendola, D-ro Flavio Losano, D-ro Giorgio Losano, S-ro G. Lucchetta, S-ro G. Zamini Saccani, preskaŭ ĉiuj en Italujo, pere I.E.F., kune 19 MA, 1 MJ kaj 2 JMJ; F-ino Klara Walden, Svedujo, 2 MA.

Entute : 240 MA, 30 MJ, 6 J-MJ kaj 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec no. "Esperanto" 1960).

FONDAĴO ZAMENHOF

Antaŭa sumo 18.625,33 gld.

S-ro I. Čače, Sovetunio, 3,—gld.; F-ino K. Walden, Svedujo, 20,— gld.

Entute 18.648,33 gld.; je 1. 8. 61.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-Jaro !

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro L Vicino, Argentino, 10,— gld.; F-ino K. Walden, Svedujo, 20,— gld.

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro E. F. Dean, Britujo, 50,30 gld.; RK-pastro, Stoke, Britujo, 21,13 gld.; S-ro K. Weile, Danujo, 3,92 gld.; S-ro G. Jocham, Germanujo, 2,71 gld.; S-ro H. S. M. Hostel, Novzelando, 5,— gld.; S-ro I. Čače, Sovetunio, 3,— gld.; S-ro Wm. Gerber, Usono, 8,08 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Interrilatigi korespondemulojn tra la tuta mondo sendube estas unu el la plej efikaj rimedoj por vivigi la lingvon, kiam rekta uzado ne estas ebla. Jen la celo de la Koresponda Servo de U.E.A. (K.S.M.) 12, rue des Jacobins, Clermont-Fd (PdD) Francujo. Petante adresojn bonvolu PRESLITERE skribi vian kompletan adreson kaj aldoni kelkajn informojn pri aĝo, profesio, ĉefaj interesoj ktp. Sen pago alskribintoj ne rajtas je rekta respondo de la korespondservo. Iliaj adresoj estas transdonataj laŭ taŭgaj okazoj al interesatoj, kiuj aldonis internacian respondkuponon (t.e. por ĉiu petata adreso unu rpk. aŭ samvaloran francan poŝtmarkon). Al ili la korespondservo sendos rekte adresojn kiel eble plej konformajn al iliaj deziroj laŭ la disponebla materialo. — K.S.M. ne publikigas anoncojn de korespondemuloj, sed nur peras adresojn inter korespondemuloj sekve al rekta alskribo.

Por doni novan impulson al nia tutlanda lernantaro, skribu por korespondi, gazetojn, propagandilojn ktp. Nepra respondo. Represo petata ! Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 44, Rosario, Argentino.

Por varbi lernantojn al planita kurso, la Esperantoklubo en Strängnäs aranĝos ekspozicion kaj deziras poŝtkartojn kaj leterojn el la tuta mondo. Respondon garantias : S-ino Irma Ekholm,Skogsvägen 31, Strängnäs, Svedujo.

Hendrik van Dalen, librovendisto (44-jara), Gen. v. Daalenstr. 32, Rijswijk (ZH), Nederlando, deziras korespondi kun samideanoj en Brazilo, Islando kaj Japanujo pri literaturaj kaj sociaj tempj.

Avri Salamon, Qiryat-Motzkin, P.O.B.8 (Israelo), deziras poŝtmarkinterŝanĝadon kun progresivaj kolektantoj. Afranku filatele !

Ĉiulandajn neuzitajn poŝtmarkojn en kompletaj serioj, serioze interŝanĝas S-ro Juan Reguant, str. Rambla 99, Sabadell, Hispanujo. Ĉiama anoncvalido.

Turismajn broŝurojn tutmondajn interŝanĝas kontraŭ hispanaj. S-ro Antonio Carceller, str. Viladomat 158, Barcelona 15, Hispanujo.

Mi bezonas kunlaborantojn esperantistojn, prefere intelektulojn, por organizi en ĉiu nacio komercajn agentojn pri ekspertado, eksportado kaj enlanda komerco. Unika oportuneco. Ne estas necese koni la komercan mondon nek havi kapitalon. D-ro V. Pedro Signes, Monjas Clarisas 20, Oliva (Valencia) Hispanujo.

Mi povas loĝigi du samideanojn en ĉambro (du litoj) kun angla matenmanĝo po dek ŝilingoj ĉiu persono ĉiunokte. F-ino Spencer, 66 St. James Road, Shirley, Southampton.

Gazetabono interŝanĝe. Mi serĉas bonvolan samideanon el okcidentaj landoj, kiu abonus por mi el niaj ĉefaj gazetoj. Mi interŝanĝe abonus por li la novan gazeton "Hungara Vivo". Skribu al Rafael Bartal, Héreg, Komárom megye, Hungarujo.

Ĉu vi ĝuis la Kongreson en HARROGATE ?

Ĉu vi deziras pli bone konatiĝi kun la kongreslanda popolo kaj ĝia kulturo ?

Tuj aĉetu la elstaran verkon

ANGLA ANTOLOGIO

Red. W. Auld kaj R. Rossetti

Eldonis U.E.A.

Prezo : 10.— gld; 40 steloj; £ 1

Mendu ĉe U.E.A. !



Prezo : 5.— gld., 20 steloj

"Mi tre ĝojas, ke vi sukcesis pliriĉigi nian neabundan fakan literaturon per ankoraŭ unu valora popularscienca libro, kaj mi kore vin gratulas pro ĝia bonkvalita enhavo. Ĝi estas tute distra legaĵo, ĝuste el la speco, kiun ni tiel ege bezonas."
(D-ro Paul Neergaard (Kopenhago) en letero sendita al la reverkinto la 4.1.1961.)

Eldoninto en okcidento : U.E.A.

Vejle

La aŭtunaj feriaj Esp-kursoj en Vejle, Danlando, okazos 15.-22. de okt. Ni kore invitas vin. Senpaga programo havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando

FERMENTARIO

GRAVA VERKO DE UNIVERSALA VALORO
unu el la ĉefaj de la urugvaja pensulo
D-ro CARLOS VAZ FERREIRA

El la hispana lingvo tradukita de Prof. Manuel Fernández Menéndez kaj reviziita de Akademiano D-ro L. C. Porto Carreiro Neto kaj Prof. Ismael Braga.
Aldone biografio kaj portreto de la aŭtoro kaj antaŭparolo kaj glosareto de la tradukinto.
Volumo : formato 21 × 15; 264 paĝoj; bona papero; bone bindita per kartoneto kun bela kovrildesegno.

Prezo US $ 2.00 (du dolaroj) afrankite

La libron liveras UEA, la diversaj libroservoj kaj la eldoninto

URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO
Calle Yaguarón 1397 - MONTEVIDEO (URUGVAJO)

Ĉu vi aŭdis la festparoladon kaj la I.S.U.-prelegon "La parolarto en la Internacia Lingvo" en la Kongreso en Harrogate ?

Se jes, aĉetu nepre la verkon **RETORIKO!**

Se ne, aĉetu nepre la verkon **RETORIKO!**

Eldono de la aŭtoro. Prezo : 11.— gld, 44 steloj bind.;
9.— gld, 36 steloj broŝ.

Mendu ĉe la aŭtoro aŭ ĉe U.E.A. !